

# EL Popola Ĉinio

人民中國報道

5 · 1963



## Buks-ligna Skulptaĵo


La buks-ligna skulptaĵo estas speco de metiartaĵo produktata en Venĝoŭ k. a. gubernioj de Ĝegiang-provinco. La substanco de tiu ligno estas solida kaj delikata, kaj tre taŭgas por skulptado. Post skulptado la artaĵo ne bezonas lakadon, ĉar polurado sufiĉas por ke ĝi estu brila kaj bela.

Prezidanto Maŭ Iras tra la Lando.

*Skulptita de Ĉen Imej*


Feliĉa Infanaĝo.

*Skulptita de Ĝang Ginsong*



Brava Ŝafisteto.

*Skulptita de Ĝang Ginsong*





# Batalo kontraŭ la Naturo

Sekegeco, malofta dum la lastaj mil jaroj okazis en la suda apudmara parto de Fugian-provinco, kaj tie okazis ankaŭ mirakla kontraŭsekega batalo, senprecedenca en la historio.

**E**KDE la mezo de oktobro, 1962, ĝis la fino de majo, 1963, dum tiuj sep kaj duona monatoj neniam pluvis ĝis plena malsekigo de la supra tertavolo en plejparto de la apudmara regiono ĉirkaŭ la mal-supraj partoj de la Naŭdraka Rivero kaj Gin-rivero en la sudo de Fugian-provinco, Ĉinio. En ĉi tiu regiono, sekegeco multfoje okazis ankaŭ en la pasinteco, tamen tia longdaŭra sekegeco kia la nuna troviĝis, laŭ registroj en dokumentoj, nur dufoje en la daŭro de pli ol mil jaroj, 790 p.K. (Tang-dinastio) ĝis la nuna tempo.

Antaŭe, kiam okazis grava sekegeco, la tero nudigis por mil li-oj kaj malsatmortintoj kuŝis ĉie. Nun, sur la vastaj kampoj de pli ol mil kvadrataj kilometroj, flaviĝintaj spikoj kurbigis la rizplantajn trunketojn, kaj sunbrunigitaj viroj kaj virinoj vigle sin okupas kun neelĉerpebla energio per diversaj irigaciaj agadoj: turni akvoradojn, fosi kanalojn, bari riverojn.

Ĉi tie grandaj ŝanĝiĝoj okazis en historio.

## La Spirito de Juĝen kaj Bangŝan

Jam alproksimiĝis la tempo por printempa semado kaj akvumado de la rizkampoj, sed sur la Ĝangĝou-ebenaĵo, unu el la ĉefaj 'grenejoj' de Fugian-provinco, la tero blankiĝis pro sekegeco, sed aperis nenia signo de pluvemo kaj eĉ guto da akvo ne troviĝis en la irigaciaj kanaletoj.

Iuj ne fidis al lukto kontraŭ la sekegeco kaj postulis ke la frusezonaj rizsemoj estu uzataj kiel ĉiutaga manĝaĵo, iuj interkonsiliĝis pri entrepreno de privata kromlaboro en alia regiono, ankoraŭ iuj forvendis siajn porkojn por aĉeti grenon kontraŭ ebla malsato. Eĉ estis iuj, kiuj genuiĝis antaŭ argilidoloj kaj preĝis por pluvo.

En la sama tempo, kuraĝa plano proponita de la gubernia komitato de la Partio estis diskutata en partia kunsido en Longhaj-gubernio sur la Ĝangĝou-ebenaĵo. La plano temis pri irigacio de la centmil mu-oj da fekundaj rizkampoj per la akvo de Hihi-rivereto, branĉo de la Naŭdraka Rivero. Por fari tion, oni devis bari Hihi-rivereton per digo longa je du li-oj, por turni la fluson orienten al Ĝangĝou tra 60 li-ojn longa kanalo.

La konstruado devis esti finita en dek tagoj. Kia malfacilaĵo! Sed la plej malfacila afero estis akiro de konsento de koncernatoj pri ofero de parto por savi la tuton. Hihi-rivereto provizas akvon por iri-

gacii la du mil mu-ojn da frua-rizkampoj de la produkta brigado Juĝen. La baro de Hihi-rivereto signifus sufokpremon je la gorĝo de Juĝen. Post la baro de Hihi-rivereto, la fluo iros tra la tero de Bangŝan-komunumo, inundante mil kaj tricent mu-ojn da malalte kuŝantaj kampoj, formante tie la ekirejon de la granda kanalo. Vasta torento englutos ĉion: la pli ol tricent mu-ojn da spikantaj triĉikplantoj, kelkdek mu-ojn da rizplantidoj, kaj ĉiujn kampojn jam sterkitajn.

La sekegeco metis tiun ĉi problemon antaŭ la popolanoj: por savi Ĝangĝou-ebenaĵon, oni nepre devis sekigi Juĝen kaj inundigi Bangŝan.

Ĉiuj okuloj turnis sin al Juĝen kaj Bangŝan. Kaj ĉi tiuj respondis brave. La partia komitato de Bangŝan-komunumo diris: La parta intereso submetiĝu al la tuteca intereso. Komencu la konstruadon senprokraste! Kaj la anoj de Bangŝan-komunumo diris, "Ne helpas multe eĉ se oron rikoltos nur nia brigado. Kvankam kelkcent mu-oj estos inunditaj tamen kelkcent mil mu-oj saviĝos de trosekeco." La kadroj kaj membroj de Juĝen-brigado same opiniis, "Unue por la centmil, poste por la dumil; nur se la tuto estos savita, tiam Juĝen estos savebla."

La plej grava kondiĉo por bari la rivereton jam pretiĝis.

Kiam la granda digo estis konstruita, milmiloj da homoj amasiĝis ĉe ambaŭ bordoj, kaj aplaudis kaj ĝojkriis. Sed subite parto de la digo falis, la riverakvo ekfluegis kvazaŭ neŝtopebla akvofalo tra la dudekmetra breĉo. Estis la 18-a de februaro. Post kelkaj tagoj estos alta tajdo kiu enpuŝiĝos de la maro enlanden je dudek kelk li-oj ĝis la granda digo. Tiam ne estos eble reŝtopi la breĉon kaj la tuta digo disfalos. Kaj la sezono ne permesis ke oni ĝin riparu post la tajdo, ĉar plantado de frua rizo sur la Ĝangĝou-ebenaĵo estis jam neprokrastebla. La rizproduktado en ĉi tiu regiono denove falis en danĝeron.

Por eliri el tiu danĝero oni nepre devis ripari la breĉitan digon en la sekvanta tago. Kaj neniu tiel kapablas fari tion kiel la juĝen-anoj, ĉar de siaj prapatroj ili jam perlaboras sian vivpanon per jungado de la maro kaj riveroj per konstruado de digoj kontraŭ ilia torento. Tio signifis, ke la juĝen-anoj estis postulataj bari sian fekundigan riveron je risko de siaj propraj vivoj.

Sed la sekvanta tago trovis, ke juĝen-anoj amase alvenas kun bezonataj instrumentoj, por kiujn al-


porti ili reiris hejmen en la pasinta nokto. Frumane ili eklaboris nudaj ĝis la talio, starante sur skalfaldoj konstruitaj sur boatoj. Ili starigis fostojn, kaj ilin enbatis per ŝtonramiloj. Kiel brilis iliaj muskoloj pro ŝvito en la frosta vento. Miloj da laborantoj sur la bordoj aplaŭdis la altnivelan teknikon de la juĝen-anoj, esperis ilian sukceson kaj kortuŝiĝis pro ilia nobla spirito.

Finfine ŝtopiĝis la breĉo en la digo. La lazura riverakvo ekfluis en la kanalon kondukantan al Ĝangĝoŭ-ebenaĵo. Tuj eksplodis aplaŭdoj kaj ĝojkrioj sur ambaŭ bordoj, kaj multaj eksaltadis de ĝojo. “Vivu Prezidanto Maŭ!” “Vivu la Komunista Partio!” Iuj saltis en la kanalon, kaj naĝadis laŭ la torento. Tiel ili ekscitiĝis! Rigardante al la fluo, 82-jara avo Zeng Vuli komentis, “Malgraŭ mia granda aĝo, mi neniam antaŭe vidis iun ajn registaron tiel kapablegan kia la nuna.” Neniu povis dormi pro ekscitiĝo. La komunumanoj amasiĝis ĉe la oficejo de la brigado aŭ grupiĝis sur la strato, senfine parolante pri la “viviga akvo”. Neniu hejmeniris eĉ ĝis la dek-dua horo meznokte. Iu komunumano proponis toston per glaso da riverakvo el la Naŭdraka Rivero, “Trinku ĉi tiun glason da ĝojiga akvo kaj penadu por riĉa rikolto en 1963!”

Savita estis la tuto, kaj ankaŭ la parto. La komunumanoj loĝantaj ĉe la plej malsupra parto de la rivero venis al Juĝen kun traktoroj kaj pumpiloj; pli ol cent plugistoj alvenis kun siaj bovoj sur boatoj, aŭ simple naĝis tien. Ili helpis al la juĝen-anoj utiligi la akvon de la tiam ankoraŭ ne barita Bejhirivereto por akvumi parton de la kampoj. Sur la inundita tero de Bangŝan oni ankaŭ rapide konstruis digojn kaj forĉerpis la superfluan akvon. Dank’ al la helpo de membroj de aliaj komunumoj, la inunditaj kampoj estis plantitaj per rizplantidoj en

*Angulo de la pumpstacio, per kiu Giaŭvej-popolkomunumo en Longhaj-gubernio ĉerpas akvon el la Naŭdraka Rivero por irigacii siajn kampojn.*

*Foto de Jang Hianghian*



nur kelkaj tagoj. Iuj laŭdis ĉi tiun aferon dirante, “Jen, sukerkano dolĉa je ambaŭ finoj.”

Juĝen kaj Bangŝan ne estis la nuraj unuoj karakterizitaj per ĉi tiu nobla spirito. Tra la suda parto de Fugian-provinco, kie furiozis batalo kontraŭ la sekegeco, estis multaj okazajoj same kortuŝaj, kiel cedi akvon vivdonan al aliaj komunumoj, lasi aliajn uzi iliajn kampojn por kreskigi plantidojn. . . . En Pinghe-gubernio, du brigadoj, inter kiuj antaŭ la Liberiĝo regis malpacado rezultita de armita konflikto pro akvo, kiu kaŭzis morton de pli ol cent homoj, ĉi-jare eĉ fariĝis intimaj amikoj dum la komuna batalo kontraŭ la sekegeco. La brigado ĉe la supra parto de la rivero cedis akvon al tiu ĉe la malsupra parto, tiel ke la tieaj sekigitaj kampoj de 180 muoj povis esti ĝustatempe plantitaj.

La diro ke “la supro kaj malsupro de 1’ rivero senfine daŭras en kverelo” jam arkaikiĝis. La malnovaj konceptoj kaj fenomenoj estas anstataŭitaj de nova, nobla spirito. Ambaŭ bordoj de la Naŭdraka Rivero estas savitaj, la regiono de suda Fugian-provinco estas savita, kaj kreskas komunismaj pensoj.

### Luktado inter Novo kaj Malnovo

Okcidente de la Ĝangĝoŭ-ebenaĵo ĉe ambaŭ flankoj de la Naŭdraka Rivero estas la ok popolkomunumoj de Ĝangĝoŭ kaj unu ŝtata agrikulturejo. Ĉi tie montetoj kuŝas post montetoj, kaj la terasaj kampoj aspektas kiel skvamoj. Dum nia veturado de 30-40 li-oj tra tiu distrikto ni vidis eĉ ne unu ebenan kampon kun areo de kvin mu-oj. Sed la rizrikolto de Ĝangĝoŭ, laŭ takso bazita sur la nunaj kondiĉoj probable atingos “tri superojn”, t. e., la tuta produktokvanto superos la plej altan en la historio, la produktokvanto pomua superos la plej altan en la historio kaj la kulturita areo superos tiun de la plano.

Tio ke la jaro de sekegeco fariĝas jaro de “tri superoj”, multe dankas al la helpo donita de la moderna industrio.

Unue, lasu nin rakonti pri la konstruo de la Elektra Pumpstacio Tienbaŭ de Tienbaŭ-popolkomunumo. Tienbaŭ aspektas kiel pelvo, en kiun fluas ĉiom da pluvakvo de la najbaraj 100 kvadrat-kilometroj. Laŭ la konstruprojekto, la kapacito de la stacio estos pli ol 4,000 kilovatoj, kaj ĝi povas levi akvon de la malsupro ĝis la supro, tra kvar ŝtupoj, kaj irigacii pli ol 60,000 mu-ojn da rizkampoj. Antaŭe la vilaĝo ĉe la fundo de la “pelvo” suferadis de inundo dum pluvego. La vilaĝanoj kutimis supreniri al la dua etaĝo de



sia domo dum pluvo kaj kiam la inundakvo leviĝis ĝis la dua etaĝo, ili devis forlasi ĉion kaj forfuĝi. En oktobro lastjare, kiam la unua ŝtupo de la pumpstacio estis finkonstruita, 16,000 mu-oj da rizkampoj fariĝis "sekurigitaj kampoj" kontraŭ sekeco kaj inundo. Sed oni devis ankoraŭ konstrui la duan, trian kaj kvaran ŝtupojn, por ke la restantaj 50,000 mu-oj estu protektataj. La riverakvo devis esti kondukita trans 24 montetojn. La sekegeco de la kuranta jaro urĝigis la kompletigon de ĉi tiu konstruo. En marto, la Urba Komitato donis urĝan ordonon tuj ekkonstrui portempajn konstruaĵojn por la dua kaj tria ŝtupoj de la stacio.

Novajoj plaĉas al ĉiuj, sed io eksterordinare nova ofte vekas dubojn. Iuj el la komunumaj kadroj kaj membroj ne kredis ke la riverakvo povos flui trans la montetojn. Ili opiniis, ke estus pli bone fosi putojn, anstataŭ entrepreni tian ludon.

Dum la procedo de la konstruado disvolviĝis la batalo inter la kredo al la moderna tekniko kaj la dubo pri ĝi. Tiu batalo speguliĝis en jena ŝerco, ke tombeto kun la surskribo sur bambu-tabuleto "Tombo de Direktoro Lin" estis formita sur la kanalfluejo. Tio estis faro de brigadestro kiu ne kredis ke la riverakvo fluos sur la montdeklivojn pli ol du dek li-ojn for de la rivero. Li antaŭjuĝis ke la direktoro de la konstruejo nepre fiaskos.

Post kelkaj tagoj, kiam la pumpiloj ekfunkciis en la stacio, la riverakvo torente supreniris, transfluante unu monteton post alia, kaj forlavis la "tombon" kun ĝia surskribotabuleto. Ĉiuj vilaĝoj sur la montoj ektumultis pro la alfluo de akvo. Iu sepdek-jara avino iris kun sia nepo sinsekve ok fojojn al la tria ŝtupo de la stacio por ĝui la spektaklon. Ŝi ripetis al la rigardantoj, "Pardonu miajn feŭdismajn vortojn, sed mi diras, ke nun la homoj diiĝis. Oni diris, ke la akvo venu, kaj jen ĝi venas!" Ŝi havis motivon tiel diri. En la jaro 1943, sinsekve 100 tagojn ne pluvigis. Tiam la vilaĝanoj elportis el la templo la idolon de la bofilo de la Ĉiela Imperiestro. Laŭdire, se oni turmentus la idolon per la sunbrulo por sufiĉe longa tempo, la Ĉiela Imperiestro lasus pluvigi por lin savi de varmego. Sed tiam oni eĉ vipadis la idolon de lia bofilo por kelkaj tagoj, sed eĉ ne guto da pluvo ekfalas. Oni nur vane klopodis. Kaj oni ellernis el tio, ke dioj ne estas. De generacioj la vilaĝanoj loĝantaj laŭlonge de la kanalo, rigardis akvon kiel fenomenon de feliĉego. Kiom da jaroj ili jam plorpetis, sopiris, preĝadis por akiri akvon, sed vane. Nun, dum la plej sekega jaro riverakvo tamen venis sur la montetojn. Post la forlavo de la "Tombo de Direktoro Lin" aperis sur la riverbordoj sloganoj skribitaj de la popolanoj mem: "Vivu la Granda Antaŭensalto!", "Vivu la Popola Komunumo!", "Vivu Prezidanto Maŭ!", "Vivu la revoluciaj kadroj!", "Vivu la laborantaj popolanoj!".

El la pumpiloj de pli ol 7,000 ĉevalpovoj de Ĝang-ĝoŭ, kiuj ludis gravan rolon en la batalo kontraŭ la



Briko-gravuraĵo el Hujĝoŭ: Koko. de Vang Huaiŝun


sekegeco ĉijare, tiuj kun 5,000 ĉevalpovoj estis aldone instalitaj en la lastaj du jaroj. Iuj el la kampoj sur la deklivoj estis akvumitaj per pumpiloj kune funkciantaj en sep ŝtupoj. La jenaj ciferoj montras la povon de la maŝinoj: en 1955, dum la tri-monata sekegeco, dekmiloj da muoj da frurizkampoj ne povis esti priplantitaj pro manko de akvo, ĉar tiam la agrikulturaj kooperativoj posedis neniun pumpilon. Ĉijare, en sekegeco de sep kaj duona monatoj, la areo plantita estas super tiu de la plano kaj la po-mua produkto-kvanto, laŭ takso, estos pli ol tricent ĝin-oj. La komunumanoj diris:

"Estas tri manieroj en tri periodoj: antaŭ la Liberiĝo la kamparanoj unuopaj ne kapablis kontraŭstari la sekegecon, kaj ilia sorto estis forvendo de siaj kampoj kaj gefiloj por supervivi la katastrofon. Dum la periodo de kooperativo, la kamparanoj batalis kontraŭ sekegeco per akvoradoj kaj transportado de akvo. Estis penige kaj malrapide. Post la starigo de la popolkomunumoj, oni havas nun pumpilojn k. a. kontraŭ-sekegeajn maŝinojn kiuj ja estas multe pli efikaj.

La agrikultura produktado trairas grandajn ŝanĝojn, puŝate de la starigo de la komunumo kaj moderna industrio.

La naturo limigas la homojn, sed nun la homoj klopodas reformi la naturon.


## Abundaj Varoj, Vigla Komerco



Ĉie en Pekino oni povas vidi tiajn legombudojn. Jen unu ĉe Hidan-strato en la Okcidenta Kvartalo, kie vendiĝas tomatoj.

Foto de Li Ĉangjong

En la magazenoj buntaj kaj abundaj ĉiutagaj bezonaĵoj sin prezentas por laŭbontrova kaj laŭbezona aĉeto de la klientoj. Foto de Ĉu Jing



**A**BUNDECO da varoj kaj vigleco de komerco en la urbegoj de Ĉinio ĉijare frapas la okulojn. Iliaj stratoj estas plenaj de vendostandoj kaj vendoĉaroj kun amasoj de freŝaj legomoj kaj fruktoj. Fiŝoj, viando, ovoj en la vendejoj de nutraĵoj kaj varoj por ĉiutaga uzo en la ĉiovendejo rimarkinde multiĝis.

Ĉijare niaj grandaj urboj ĉiam havas sufiĉe da legomoj por la konsumantoj. Post la unuaj tagoj de majo, amasoj post amasoj da tomatoj, melongenoj, kukumoj, brasikoj, guŝoj ktp. entute du-tridek legomspecoj enfluas kaj plivigligas la legommerkaton. Ekde la mezo de junio ĝis la komenco de julio, Pekino, Ŝanhajo, Kantono k.a. sume dudek tri urbegoj kaj industriaj centroj ricevis por vendi pli ol 5 cent milion kilogramojn da legomoj. En julio, Pekino havis sian plej abundan rikolton de tomato, kaj ĉiutage vendis meznombre pli ol 3 milionojn da kilogramoj. La legomoj diversloke vendataj en la kuranta jaro estas plejparte ĉirkaŭ urbaj rikoltaĵoj en la sama tago de vendo kaj ege freŝaj. La prezoj de tiuj legomoj estas multe pli malaltaj ol tiuj en la pasinta jaro. Ekzemple, en la lastaj tagoj de julio, la plej alta prezo de tomato estis tri cendoj por ĝino kaj tiu de beninkaso nur du cendoj\* por ĝino. Dek cendoj jam sufiĉas por mastrino por aĉeti plenan korbon da freŝaj legomoj.

Ankaŭ la enmerkata kvanto de fruktoj, viando, kokoj, anasoj, fiŝoj kaj ovoj en diversaj lokoj superis tiun de la pasinta jaro. Tio rezultis el laŭplana disvolvo de la produktado fare de la ŝtataj farmoj kaj la popolkomunumoj en la kamparo. En somero, liĉioj, bananoj, anasoj de suda Ĉinio kaj akvomelonoj, dolĉaj melonoj, pomoj, miel-persikoj de norda Ĉinio amase fluadas en la merkaton kaj la ŝtataj kaj kooperativaj fruktovendejoj, fruktobudoj kaj fruktoĉaroj ĉiuj plenas de freŝaj fruktoj multkoloraj. De kiam ekvendiĝis la novaj fruktoj ĝis la fino de junio, Pekino, Ŝanhajo k.a. kvin urboj ricevis pli ol cent milion ĝinojn da fruktoj. En julio, la fruktomerkato pli prosperas. Ĉe la fino de julio, ĉ.



du milion ĝinoj da akvomelonoj venis ĉiutage en la pekinajn vendejojn kaj oni povis aĉeti unu akvomelonon per nur kelkdek cendoj.

Post la Printempa Festo, fruktoj neniam mankas en la vendejoj. Eĉ dum la malabunda periodo de januaro ĝis aprilo, sur la bretoj de la fruktovendejoj en Pekino, Ŝanhajo, Tiangin, Harbin, Vu-han, Kantono, Ĉunkino, Ĉengdu k.a. urboj atendis siajn klientojn multe da pomoj, oranĝoj, mandarinoj, piroj k.a. Antaŭe kiam malvarmo de printempo ankorau vagis en la nordo, la loĝantaro de Harbin, la plej norda urbo de Ĉinio jam frandis freŝajn liĉiojn el Guangdong-provinco kaj la famajn lokvatojn (*Loquat Eriobotrya*) el Bajŝa de Ĝegiang-provinco.

Estas mil specoj da manĝaĵoj en la grandaj ŝtataj magazenoj por libera elekto de la klientoj. Por la loĝantoj estas aĉeteblaj ne nur freŝaj porkaĵo, bovaĵo, ŝafajo, kokoj, anasoj, fiŝoj kaj ovoj, sed ankaŭ multaj famaj produktoj el diversaj lokoj de la lando, ekzemple, la ŝinko de Ginhua, peklita anaso de Nankino, fumajita porkaĵo de Hunan kaj Siĉuan, holoturioj, fungoj ktp. La restoracioj kaj manĝejoj de diversaj lokoj estas en vigla negoco.


Pliiĝis ankaŭ la specoj de la ĉiutagaj bezonaĵoj en la ĉiovendejoj. La grandaj magazenoj de la lando havas respektive du-tridek mil specojn da komercaĵoj por vendo. Multe pliiĝis ol en la pasinta jaro ankaŭ la varspecoj de la grandaj, mezgrandaj kaj malgrandaj magazenoj kaj bazaroj. La belaj plastajoj, precipe la plastaj ŝuoj, tablotukoj kaj ĉemizoj vendataj en la magazenoj estas ŝatataj de la vastaj konsumantoj. En la unua jarduono la kvanto de elvenditaj fabrikaĵoj en la grandaj urboj, kiaj drapoj, silkajoj, brakohorloĝoj, kaŭĉukaj ŝuoj, lanfadenoj, plastaj kaj sintezfibraj objektoj ktp. estas multe pli granda ol tiu en la sama periodo de la lasta jaro, kaj tiu de kelkaj el ili multiĝis je unu aŭ du obloj.

\* 1 stelo = 22 cendoj.



La Pekina Manĝaĵo-kompanio ĉiutage liveras milojn da tiaj grasaj pekinaj anasoj al la loĝantoj.

Foto de Hie Li




"Kiu estas pli bona?" Jen sceno ĉe akvomelona vendostando de Vangfuging-strato.

Foto de Giang Kiŝeng

En la manĝaĵo-sekcio de la Vangfuging-a Magazeno en Pekino.

Foto de Vang Jing



# La Industria Produkto


## de la Unua Jarduono de 1963

La produktado de ĉina industrio en la unua jarduono karakteriziĝas per la jenaj trajtoj:


### 1) Firmpaŝa supreniro:

Diversaj industriaj produktaĵoj pliiĝis ol en la sama periodo de 1962. Interalie la kresko de la totala valoro de la produktaĵoj, kies kruda materialo estas agrikulturaj kaj kromokupaj produktaĵoj, atingis 20%.

### 2) Kvalito plialtigita:



La kvalifikeco de gisfero estas 99%.



La unuaklasa produkto de ŝtalmaterialo atingis 95%.



La unuagrada produkto de kotonteksaĵo atingis 97%.

### 3) Specoj plimultigitaj:




Ŝtalmaterialo — pli ol 300 novaj specoj sukcese provfaritaj.




Maŝinoj—pli ol 220 novaj specoj sukcese provfaritaj.


### 4) Ŝparo de krudmaterialo kaj malpliigo de konsumkvanto:



Uzo de karbo en elektrejo — malpliigo de karbokonsumo por ĉiu kilovathoro je 23 kilogramoj.



Elektrenergio — Pekino k. a. 5 urbegoj ŝparis de januaro ĝis majo 200,000,000 kilovathorojn.



Koakskonsumo en ferforĝado—por produktado de ĉiu tuno da fero malpliĝis je 61 kilogramoj.



# Somero en Kantono


SOMERO alvenas tre frue al Kantono, urbo en suda Ĉinio. Ĉirkaŭ la 10-a de aprilo oni jam demetas siajn lanajn vestojn kaj vestiĝas per someraj kostumoj, kaj la naĝejoj komencas akcepti klientojn.

Estas varmege en Kantono precipe ĉi tiun someron, ĉar ekde lasta aŭtuno jam por pli ol ducent tagoj ne falis pluvo, kia povas plene malsekigi la soifan teron, kaj regis severa sekegeco, malofta en la pasintaj sesdek jaroj. Sed, kiel diras kantonanoj, neniu signo de sekegeco montriĝis, kaj tio donas apartan karakterizon al la somero de ĉi tiu jaro.

Rigardu! Kiel verdas la rizkampoj en la ĉirkaŭurbo! La fruaj rizplantoj, ĝustatempe plantitaj sur pli ol milionoj da mu-oj da tero, jam plenkreskiĝas kun dikaj spikoj. Frusezonaj melongenoj, diversspeciaj kukurboj, legumenoj, legomoj . . . aŭtojn post aŭtoj transportiĝas en la vendejojn, pli ol miliono da ĝin-oj potage dum la lastaj kelkaj monatoj. Fruktovendejoj pleniĝas je bananoj, akvomelonoj, prunoj, liĉi-oj. . . Kaj porkaĵo, kokidoj, anasoj, ovoj, fiŝoj kaj salikokoj por vendo duoble aŭ kelkoble pliiĝis ol en la sama periodo lastjare. Kradrostitajn anserojn kaj ovojn oni povas laŭplaĉe elekti kaj aĉeti je

*Sur la bordo de la Perlo-rivero.*

*Foto de Deng Jongking*



*La naĝejo ĉe Erŝatoŭ de Kantono.*

*Foto de Li Venfang*

ĉirkaŭ unu juano po ĝino. Ĉiutage pli ol dek mil ĝinoj da fiŝoj el laĝetoj iras sur la merkaton, krom eĉ pli multe da marproduktajoj.

Abundaj varoj je malaltaj prezoj sur la merkato en jaro de sekegeco — jen estas rezulto de la disvolviĝo de produktado kaj konstruado dum la pasintaj kelkaj jaroj. Ekzemple, al la rizkampoj, legomkampoj, fiŝlaĝetoj . . . ne mankas akvo en jaro de sekegeco, tiel ke oni diras, “Sekas la vetero, tamen ne la tero”. Antaŭ la Liberiĝo, la ĉirkaŭurbo de Kantono posedis nur 5 pumpilojn por pli ol sepcent mil muoj da kampoj, sed nun tiuj kampoj estas irigaciaj per 464 elektraj irigaciaj stacioj, kun pli ol 20,000 ĉevalpovoj. La fabrikoj en Kantono senĉese sendas al la kamparoj ekipaĵojn kiel pumpilojn ktp. por kontraŭbatali sekegecon, kaj dekmiloj da tunoj da akvo ĉiutage estas kondukataj al la kampoj en la ĉirkaŭurbo, tial la rizplantoj tre bele kreskas.



*Kampanino de la antaŭurbo de Kantono rikoltas liĉiojn. Foto de Ĉen Nanŝeng*

Somero sin prezentas en Kantono per siaj apartaj karakterizajtoj. En la fabrikoj ekfunkcias instalaĵoj por malaltigi la temperaturon. Tie ekzumas ventoliloj kaj elektraj ventumiloj. Apud la kajoj ĉe la riverbordoj konstruiĝis ŝirmilaj bambuaj ombrodonaj tegmentoj por la portistoj.

## GAŬ GUANGGIAN:

# Plasta Industrio de Ĉinio

**A**NTAŬ la Liberiĝo, en Ĉinio preskaŭ ne ekzistis plasta industrio. Tiam, nur malmultaj fabrikoj en Sanhajo kaj Tiangin produktis iom da malbonkvalita fenolaldehido. Post la Liberiĝo, precipe post 1958, la plasta industrio de Ĉinio rapide disvolviĝis, kaj jam povas produkti pli ol dek specojn de plasto. Krom tiu de fenolaldehido, produktiĝas ankaŭ la polietilena, polivinil-klorida, organikavitra, asbesta plasto ktp. La tuta produktokvanto estas kelkcent oblojn pli granda ol tiu antaŭ la Liberiĝo.

Nun, en pli ol dudek provincoj kaj urbegoj plasta industrio jam estas establita. Ekzemple en Kantono, antaŭ 1957, nur malmultaj fabrikoj produktis butonon,

Ĉie vidiĝas klopodoj priservi la vastan popolamason kontraŭ la varmego. Preskaŭ ĉiu apoteko ofertas kontraŭvarmegajn medikamentojn por vendo. Pli ol cent manĝejoj samtempe provizas la klientojn per malvarmaj trinkaĵoj kaj eĉ vagonaroj kaj ŝipoj havas sufiĉan provizadon de glaciaĵo, sodakvo kaj aliaj malvarmigaj trinkaĵoj.

Oni pli multe uzas kaj trinkas akvon en tiaj varmegaj tagoj. Por plibonigi priservon al la urbanoj tiurilate, la Akvo-kompanio de Kantono anstataŭigas iujn akvotubojn per pligrandaj kaj instalas novajn tubliniojn por pli foraj lokoj ekster la urbo. Je la fino de majo, oni ĵus finis instalon de akvotuba linio kun pli granda diametro kaj longeco de tri kilometroj, tiel ke loĝantaro en la antaŭurbo pli facile akiras akvon. En la komenco de junio, pligranda tublinio estas instalita en alia parto de la urbo. La koncerna fako de la Kantona Magistrato senpage provizas akvon al la loĝantaro de Hongkongo.

Krom la tradiciaj teejoj, parkoj kaj naĝejoj, urbanoj de Kantono ĉijare havas ankaŭ aliajn interesajn ejojn por somera distrado. Unu el tiuj estas la "Pavilono Ŝuhong" en la mezo de lageto kun koncertkafejo. Alia interesa amuzejo estas "La Edeno kun Floroj kaj Birdoj", kie oni povas ĝui la aromon de floroj kaj kantadon de birdoj, trinki teon kaj aŭskulti muzikon.

Kvankam la vetero en Kantono estas eksterordinare varmega kaj sekega ĉijare, en la urbo tamen regas prospero, ĝojo.

lampingon kaj aliajn simplajn objektojn. En 1957, la Plasto-Fabriko Nanĝong komencis produkti plastaĵojn per polivinilklorida rezino liverita de Sanhajo kaj aliaj urboj. Kaj en tiu sama jaro la Kantona Plasto-Fabriko estis konstruita por produkti polietilenon. En 1960 la Ĝugiang-a Plasto-Fabriko, kiu speciale produktas celulojdaĵojn k.a., komencis sian produktadon. Nun en Kantono jam troviĝas pli ol dek fabrikoj produktantaj plaston aŭ plastaĵojn. En la produktataj artikloj estas diversaj plastaj ŝuoj, pluvmanteloj, elektraj torĉoj, saposkatoloj, pelvoĵoj, teleroj, tasoĵoj, tablotenisaj pilkoĵoj, infanludiloj kaj aliaj plastaĵoj bezonataj de diversaj fakoj de la nacia ekonomio.




Laŭ la bezono de la disvolviĝanta plasta industrio, multaj fabrikoj plimultigas la produkton de plastigiloj. Ĉar polivinil-klorido estas la plej grava en la produktado de plasta industrio, kaj plastigilo estas grava helpmaterialo en la produktado de polivinilklorido. La administra institucio de kemia industrio de Tiangin helpis al la Tiangina Solvila Fabriko, kiu produktas plastigilojn, plimultiigi maŝinojn kaj laboristojn, kaj fari paŝojn por pliproduktado. Dank' al tio la plastigilo produktita de ĉi tiu fabriko de januaro ĝis aŭgusto de 1962 egalas al la tutjara produktokvanto de 1961.

Dum lastaj jaroj, en la plasta industrio de Ĉinio ne nur plimultiĝis la produktokvanto, sed ankaŭ rapide plialtiĝis la teknika nivelo de produktado. La produkta tekniko de polivinil-klorido kun diversaj normoj jam estas mastrita, la kvalifikaj elcentoj atingis 90 ĝis 100, en la plej multaj entreprenoj la viskozeco, kaj la enhavokvanto de akvo kaj fero atingis aŭ superis la normon difinitan de la ŝtato.

Por produkti pli multajn kaj pli bonajn plastajojn, en multaj plastaj fabrikoj disvolviĝis labora konkurso. Ekzemple en la Dua Plasto-Fabriko de Tiangin, en 1962 okazis kampanjo por pli bona kvalito, pli multigo de specoj, malmultigo de materialkonsumo, malaltigo de produktokosto kaj altigo de laborproduktiveco. De januaro ĝis septembro de 1962, tiu ĉi fabriko bone plenumis la sinsekvajn monatajn produktopianojn. El la 130,000 paroj da plastaj ŝuplondoj produktitaj en julio kaj aŭgusto de 1962, la kvalifikaj elcentoj atingis 100. En la pasinteco la harligaj fadejoj produktitaj de ĉi tiu fabriko estis ne-tubaj, kaj iliaj koloroj estis tre malmultaj. Nun ili estas farataj tubformaj laŭ la postulo de la kosumantoj, kaj iliaj koloroj plimultiĝis. Ankaŭ la pluvmanteloj, antaŭe nur en grizo, nun estas en sep koloroj, inkluzive de ruĝo, verdo, bluo, blanko k.a. De januaro ĝis aŭgusto de 1962 la totala produktokosto malaltiĝis je 3.2 elcentoj kompare kun la plano, la labor-produktiveco de

*Plektitaj plastomansakoj.*

*Foto de Jang Limen*



*Plastajoj por agrikultura kaj industria produktado.*

*Foto de Ding Gjun kaj Huang Venhoŭ*

julio plialtiĝis je 28.5 elcentoj ol tiu de junio, kaj plie la aŭgusta plialtiĝis je 12.2 elcentoj ol la julia.

Por subteni agrikulturon, multaj studaj institucioj kaj produktaj entreprenoj turnis sian atenton al la studado kaj produktado de plastajoj por uzado en la kamparo, kaj akiris tre grandajn sukcesojn. Ekzemple, lasttempe la Tiangina Moderna Kemia Fabriko sukcese elfaris plaston akvotubon, speciale por la bezono de agrikultura produktado. Tian akvotubon la Traktora Riparejo de Ding-gubernio de Hebej-provinco jam almuntis sur akvolevilon kaj oni pruvis en provuzado, ke ĝi estas pli fortika, oportuna kaj povanta ŝpruci pli multe da akvo ol la fera tubo uzata en la pasinteco.

Enketinte la postulojn de kamparanoj, la Pekina Plasto-Fabriko produktis multajn varojn taŭgajn por uzo en la kamparo, ekz. pluvmanteloj, plidikigitaj ŝuplondoj ktp. La Nankina Plasto-Fabriko elfaris klapon de akvolevilo el plasto, kaj praktike uzite en vilaĝo ĝi pruviĝis tre bona, malpeza kaj solida.

Krom helpi agrikulturon, la ĉinaj plastajoj estas uzataj ankaŭ en peza industrio, ekz. en maŝinfabrika industrio, elektra industrio ktp.

Kvankam jam multe disvolviĝis la plasta industrio de Ĉinio, tamen pro la multeco de la loĝantaro, kaj grandeco de la postuloj de la diversaj sektoroj de la nacia ekonomio al la plasta industrio, ĝia produktopovo ankoraŭ ne povas tute plenumi la bezonon.

Tamen, Ĉinio havas riĉan materialon kaj industrian de kaŭstika ŝodo kun granda produktopovo kies kroma produktajo — kloro estas ĝuste krudaĵo de polivinilklorido. Dank' al la kelkjara konstruado nun la ĉina plasta industrio jam havas certan fundamenton en ekipado kaj tekniko, kaj estos sufiĉe vasta horizonto por ĝia estonta disvolviĝo.

# Reviviĝis Mano Detranĉita



*La mano de Vang Cunbaj jam povas skribi.*

*Foto de Vang Zigin*

**H**IRURGO de la Sesa Popola Hospitalo de Ŝanhajo sukcese faris operacion maloftan en la mondo. Li mal'amputis la dekstran manon de unu laboristo tute fortranĉitan ĉe la pojno.

Tia operacio sukcesis la unuan fojon en Ĉinio. Depost la operacio ĝis nun pasis jam sep monatoj, kaj per radioskopia ekzameno kaj ekspertizo de famaj ĥirurgoj, oni konstatis ke la sango-cirkulado de tiu mano estas normala, ĝiaj ostoj, nervoj kaj muskoloj bone kunkreskiĝas, kaj krome ĝi jam havas senton pri varmo kaj malvarmo. La malsanulo nun jam povas levi tason por trinki, skribi kaj preni objekton 4-kilograman per tiu mano.

La vundito, Vang Cunbaj, estas 27-jara laboristo de Ŝanhaja Maŝinfabriko. Matene de la 2-a de januaro, pro neglekto dum laboro, lia dekstra mano estis detranĉita de premformiga maŝino ĉe loko unu colon super de la pojna artikolo. La malsanulo kaj la detranĉita mano estis tuj portitaj al la Sesa Popola Hospitalo por esti urĝe kuracataj.

Laŭ la klinika sperto en ĥirurgio, estas multe pli malfacile revivigi per kunigo manon tute fortranĉitan ol parte derompitan. Laŭ la kutima kuracado la ĥirurgo ĝenerale faras nur antisepsan bandaĝadon al la rompita pojno kaj adapti al ĝi manon artefaritan post resaniĝo de la vundo. Sed la kuracaj laborantoj de la hospitalo decidis praktikon kunigi la rompitan manon kun la pojno.

La operacio estis farita post ĉ. duonhora de la akcidento. Ĉion prizorgis junaj kuracistoj edukitaj post la Liberiĝo. La helpokuracistoj diplomigis nur antaŭ nelonge. En intima kunlaborado de la divers-fakaj laborantoj de la hospitalo, ili unue kunigis la ostojn kaj la naŭ ĉefajn muskolojn, kiu funkciiĝas la fingrojn. Sekvis la kunigo de la sangotuboj. Tio ĉi estas la plej grava parto de la operacio. La kuracistoj ne uzis la temporaban metodon de stebado, sed anstataŭe alprenis la novan metodon de inga kunigado, rapide kaj glate kunigis la kvar ĉefajn sangotubojn de la mano, kaj refunkciigis la sango-cirkulon ĉesintan jam kvar horojn, kaj tiel certigis reviviĝon de la mano.

Laŭ medicina registro de eksperimentoj faritaj al bestoj, rompita membro, kies sangocirkulo ĉesis ses horojn, jam ne povas esti revivigita eĉ se oni sukcesigis la kunigon.



Post kiam la sangotuboj estis kunigitaj, la kuracistoj kunkudris unu post alia la ceterajn naŭ ĉefajn muskolojn kaj tri detranĉitajn nervojn. La tuta operacio daŭris sep kaj duonan horojn.

Post la rekunigo de la rompita mano ekestis ŝveliĝo ĉe ĝi por kelka tempo. La kuracistoj alprenis diversajn rimedojn kaj invitis famajn ĥirurgojn en Ŝanhajo por diagnoza interkonsiliĝo, kaj post efika kuraco kaj atenta flego, la ŝveliĝo fine malaperis. Post tio la kuracistoj helpis al Vang Cunbaj resanigi lian vundon de la dekstramanaj nervoj per fizioterapio. Ili faris ankaŭ operacion por formoĝustigo al la malsanulo, kaj ĉiam atentigis lin pri ekzercoj por kapabligi la pojnon kaj fingrojn sin movi. Tio ebligis, ke lia mano resaniĝis tiom rapide.


La kuraclaboron multe zorgis la respondeculoj de la Ŝanhaja Komitato de la Ĉina Kompartio kaj la Ŝanhaja Higiena Buroo. Kian Hinĝong, vicministro de la Higiena Ministerio, Ŝi Himin, sekretario-kandidato de la Sekretariejo de la Ŝanhaja Komitato de la Ĉina Kompartio k.a. ankaŭ vizitis la vunditon kaj donis tie direktivon pri la kuraco kaj flego, kio multe stimulis la malsanulon kaj kuraclaborantojn.

Laboristo-kamaradoj de Vang Cunbaj diris: "Se la akcidento okazus en la malnova socio, la vundito perdus ne nur la manon, sed ankaŭ sian laboron."





Supre: la rompita mano.  
Sube: la mano post kuraco.



Vidante, ke Vang Cunbaj jam povas levi tason, tre ĝojiĝas la kuracistoj.  
Fotoj de Vang Zigin

## En la Fabriko kaj en la Hejmo

de ĈEN ĴUJHIANG

Laboristo de fabriko de ŝpinteksaj maŝinoj

**E**N marto de la pasinta jaro, oni sendis min labori en la 4-a tornista grupo. Antaŭe mi estis estro de la 2-a tornista grupo, mi laboris jam tri jarojn kaj nia laboro estis ĉiam tre elstara. Dume la 4-a grupo estis konata en nia laborejo kiel "postiĝinta". Kial oni transpostenigas min en tiun ĉi grupon? Zorge pripensinte mi konkludis ke tio montras la fidon de la gvidantoj al mi. Por nia tuta produkta laboro ja ne sufiĉas unu aŭ du bonaj grupoj. Mi estas komunisto, ĉu mi devas fiksi miajn okulojn nur je la 2-a grupo?

En la unua tago kiam mi komencis labori en la 4-a grupo, mi trovis ke dum la laborhoroj iuj torniloj ofte ne estas okupitaj pro tio ke la laboristoj sin okupis per akriĝado de siaj tranĉiloj. La sekvantan matenon, mi venis al la laborejo pli frue kaj preparis por ĉiuj membroj de la grupo la desegnojn, materialon kaj tranĉilojn bezonatajn por la laboro de tiu tago; post la laborhoroj, mi balais la laborejon kaj ordigis ĉies ilarujojn. Nur kiam ĉio estis en bona ordo, mi forlasis la laborejon.

Iom post iom, pliboniĝis la stato de nia grupo en produktado kaj ĉiuj tre ĝojis pro tio. Tiel forpasis multe da tagoj, iuj laboristoj eksentis en si konsciencĝenon kaj diris al mi: "Majstro Ĉen, vi estas grupestro, sed ne helpa laboristo, nu, ekde nun tiujn

Ilustraĵoj de Ĉen Sivej



laborojn faru ni mem!" Sed mi pensis en mi: ja ne estas domaĝe por mi doni iom pli da faciligoj al la aliaj, se ĉiuj nur dediĉas sian tutan koron al la laboro.

Iun tagon, ekdisputis la kontrolisto kun iu juna laboristino de nia grupo, kiu pro momenta malatento ne precize observis la postulojn de la desegno kaj pro tio 600 laborpoentoj (480 laborpoentoj egalas unu labortago) devis esti kalkulataj kiel fuŝitaj. Sed tiu juna laboristino opiniis ke kulpas la kontrolisto kiu tion ne klare montris antaŭe, do ne ŝi devas preni sur sin la respondecon. Tion deklarinte ŝi foriris sen pludiro. La afero min tre dolorigis. Ne gravas al kiu kalkuli la fuŝitajn 600 laborpoentojn, sed gravas la perdo de la materialo! Nun neniu el ili konsentas preni sur sin la respondecon. Laŭ la regularo, sen atestilo de fuŝaĵo oni ne povas ricevi de la provizejo materialon, kaj sen kiu la fuŝitajn produktaĵojn ni ne povas ree ellabori, do la tuta produkta laboro estos influata. Jen grava afero koncernanta ŝtatajn interesojn! Mi do surskribis la atestilon de fuŝaĵo je mia respondeco. Tiun vesperon, kune kun alia majstro mi laboris ĝis post la 10-a horo kaj elfaris la mankantajn produktaĵojn.

En la tempo por fari trimestran resumon pri ĉies laboroj, tre malĝojis tiu juna laboristino, kiu faris la fuŝaĵon. Sed kiam statistikisto publikigis la resumon, sur la afiŝo ŝi ne trovis noton pri la 600 fuŝitaj laborpoentoj sub sia nomo. Post pridemandado ŝi eksciis ke ilin oni registris sub mia nomo. Ŝi tuj rapidis al mi kaj diris emociite: "Majstro Ĉen, pri tiuj 600 fuŝitaj laborpoentoj ja mi devas respondeci sed ne vi!" Ŝia vorto tre ĝojigis min. Ĉar tiu juna laboristino ofte estis distriĝema dum laborado kaj la kolegoj havis nenian rimedon por ŝin plibonigi. Nun versaĵne ŝi komencis koni sian eraron. Mi do diris al ŝi: "Sufiĉas, se vi nur pli zorge laboros estonte; ne gravas, ĉu tiuj fuŝitaj laborpoentoj estas registritaj sub mia aŭ via nomo." Vidante ke ŝi ankoraŭ ne povas esti trankvila, mi daŭrigis: "Okaze de produkto de fuŝaĵo, la vera suferanto estas nek vi nek mi, sed la ŝtato!" Poste tiu juna laboristino efektive ŝanĝiĝis, kaj en la fino de la pasinta jaro, ŝi okupis la unuan lokon inter la plej bonaj plenumantoj de monata produktplano.

\* \* \* \*

Suferante pro osta tuberkulozo mia edzino devis kuŝadi en la lito jam pli ol 5 jarojn kaj en mia hejmo mi havas ankoraŭ infanon 5-jaran. Ilian ĉiutagan vivon mi povas zorgi nur en mateno kaj vespero. Kiam la laboro en la fabriko estas pli intensa, mi ofte ne povis bone prizorgi ilin. Foje, dum kelkaj sinsekvaj tagoj kiam mi urĝeme revenis hejmen, mi trovis ke la varmizola botelo estas tute plena de boligita akvo kaj en la kaldrono jam pretas varma rizajo, kaj mia edzino kaj infano jam manĝis. Iutempe mi ne havis tempon por aĉeti legomojn matene, sed vespere mi trovis hejme jam kuiritajn legomojn.



Sciu, la estro de la proksima policstacio kaj iu policano Su, informiĝinte pri la stato de mia familio, ili ofte sendis boligitan akvon al mia hejmo, iafoje eĉ lavis legomojn kaj pretigis manĝaĵojn kaj foriris nur ĝis mia edzino jam manĝis.

Ankaŭ la vendistino de la legomvendejo ĉiutage sendis legomojn al mia hejmo. Foje, iu avino Jang elektis kelkajn vivantajn karasojn kaj mem portis ilin al mia hejmo. Sed eksciinte de mia edzino ke mi hejmevenos nur tre malfrue, ŝi ekkriis: "Ho, tiam la karasoj jam ne restos tute freŝaj. Prefere mi pretigu ilin hejme por vi!" Kaj ŝi tuj foriris kun la karasoj.

Alian fojon, kiam estis jam posttagmeze, mia edzino ankoraŭ ne havis por si manĝaĵon. Tion iel eksciis kelnero en la restoracio kontraŭ mia domo. Iu kelnero tuj venis al mia hejmo por prepari manĝaĵon. Sed trovinte ke nia forno jam estingiĝis, li portis la legomojn kaj rizon al la restoracio, kaj post momento, varmaj manĝaĵoj estas jam en la manoj de mia edzino.

Eĉ ankoraŭ iu junpioniro en nia strateto frekventas mian hejmon por helpi al ni en hejmaj laboroj.

...

Tiajn aferojn mia edzino rakontis al mi unu post alia kun larmo en la okuloj kaj miaj emociiĝo kaj danko estas neesprimeblaj. Mi profunde sentas la



senfinan varmecon kaj feliĉon en nia granda familio socialisma.

Ĉi tie mi ne parolu pri la prizorgado de miaj kamaradoj kaj la respondeculoj de la fabriko pri nia vivo. La policano, la legomvendistino, la kelnero, la junpioniro. . . ĉiuj estas nekonataj de mi, el ili iujn mi eĉ ne vidis ĝis hodiaŭ. Tamen ili tiel varme helpis al mi. Tiaj aferoj povas okazi nur en nia

hodiaŭa nova socio! Kvankam mi estas juna kaj pasigis malmulte da tagoj en la malnova socio, tamen la vipon kaj insultadon de kapitalisto mi jam suferis multfoje.

Mi ĉiam sentas varmon en mia koro, kiam mi ekmemoras pri la pasinta travivaĵo kaj la varmeeco kiun mi ĝuas en la nova socio. Tutkore mi volas dediĉi ĉion mian al nia fabriko!

## REKLAMO

# LEGU ĈINAJN GAZETOJN!

★ **PEKING REVIEW** semajna revuo en kiu oni povas legi opiniojn de Ĉinio pri internaciaj problemoj kaj aŭtoritatajn raportojn pri hodiaŭa Ĉinio.

★ **CHINA PICTORIAL** granda monata bildgazeto kun multflanka enhavo en belaj fotoj kaj vigla-stilaj tekstoj pri la socialisma konstruado de la nova Ĉinio.

★ **CHINESE LITERATURE** monata gazeto en la angla lingvo. Ĝi liveras al la legantoj ne nur elstarajn verkojn el la moderna kaj klasika literaturo de Ĉinio, sed ankaŭ ĝisdatajn informojn pri literaturo kaj arto en Ĉinio.

★ **WOMEN OF CHINA** dumonata gazeto kun sinteza enhavo por virinoj (en la angla lingvo).

★ **EVERGREEN** dumonata gazeto en la angla lingvo, kiu raportas al la legantoj pri la laborado, lernado kaj vivo de ĉinaj gejunuloj kaj gestudentoj.

**CHINA'S SPORTS** riĉe ilustrita dumonata gazeto en la angla lingvo pri la sportaj aktivadoj en Ĉinio.

**FOREIGN TRADE OF THE PEOPLE'S REPUBLIC OF CHINA**

trimonata riĉe ilustrita gazeto pri la ekonomia konstruado, internacia komerca aktivado kaj la stato kaj disvolviĝo de la produktado de eksportataj varoj de popola Ĉinio.

**CHINESE MEDICAL JOURNAL**

monata organo de la Medicinista Asocio de Ĉinio, kiu donas ĝisdatajn raportojn kaj informojn pri atingoj kaj disvolviĝado de medicino en Ĉinio.

**SCIENTIA SINICA** anglalingva monata gazeto eldonata de la Ĉina Akademio de Sciencoj. Ĝi donas informojn pri naturscienco kaj tekniko.

## DONACOJ POR EKSTERLANDAJ ABONANTOJ DE 1964

Al ĉiu, kiu abonos unu el la supraj gazetoj por 1964 antaŭ la 1-a de februaro, 1964, ni donacos belan tablo-kalendaron kun 24 koloraj ĉinstilaj pentraĵoj. La eldonantoj de tiuj gazetoj, kiuj estas markitaj per steleto, promesas doni krome aliajn donacaĵojn al la abonantoj.

Al ĉiu, kiu sukcesos varbi 1-2 novajn abonantojn, ni donacos ĉinstilan rulpentraĵon en koloroj kun formato 96 × 36.5 cm. Kaj al ĉiu, kiu sukcesos varbi tri aŭ pli multajn novajn abonantojn, ni donacos krome belan notlibron kun formato 17.5 × 12.5 cm.

LA ABONILON BONVOLU SENDI AL  
NIAJ AGENTAJ LIBREJOJ AŬ  
REKTE AL:

GUOZI SHUDIAN

P. O. Box 399, Peking, China.

# Dato por Geedziĝo

*Ilustraĵoj de Ĉen Ŝivej*

VESPERE, ni promenis kune laŭ la bordo de Huangpu-rivero. Mi ne vidis lin jam pli ol unu jaron kaj mi trovis, ke li plifortikiĝis. Ni interbabilis pri niaj laboro, lernado kaj vivo post la disiĝo. Kaj nature, la parolo turniĝis al la temo de nia geedziĝo. Nun li denove proponis aranĝon de nia geedziĝo. Tio min perpleksigis. . . .

Mi konatiĝis kun li en 1956 kaj iom post iom estiĝis profunda amo inter ni. Li estas oficiro de la Popola Liberiga Armeo kaj dum plejparto de la tempo laboras aliloke. Liaj gepatroj estas jam ĉirkaŭ 70-jaraj kaj havas nur lin la solfilon. Ili tre volas, ke ni geedziĝu frue por kontentigi ilian deziron. Sed tiam mi estis nur metilernanta laboristino en fabriko, kaj estis tre necese ke mi koncentrigu mian energion por lernado de tekniko. Kaj li konsentis mian opinion, dirante ke ni, ankoraŭ junaj, ne estu urĝemaj pri geedziĝo kaj konsideru pri tio post kelke da jaroj.

Fluge forpasis la tempo de kvar-kvin jaroj. Ni interkomprenis pli multe kaj de tempo al tempo kuraĝigis unu la alian. Nia komuna celo estas senĉesa levado de nia politika konscio, ke unu havigu al si kapablojn per bona ekzercado ĉe la fronto por defendi la patrion kaj la alia bone lernu en la fabriko teknikon por konstruo de la patrio. Dum tiu periodo lia klereco altiĝis de la nivelo de malsupera mezlernejo ĝis tiu de supera; dank' al la instruado de la partio kaj helpo de k-doĵ li fariĝis fortika revolucia batalanto kaj kompartiano. Kaj mi jam mastris la teknikon de tornado kaj fariĝis Tutlanda Avangarda Produktanto kaj Urba Ruĝflaga Juna Sturmanto.

Ĉiujare li havis libertempon por viziti min en Ŝanhajo. Sed pro mia okupateco ni malofte kunestis. Tio pensigis min pri tio, ke la stato eble pliboniĝos se ni estos geedziĝintaj. Ekzemple, en 1959 kiam li revenis al Ŝanhajo, en nia fabriko ĝuste disvolviĝis

bolanta kampanjo de teknika revolucio. Mi decidis ke mi antaŭdate plenumu la laborkvanton de 1960 antaŭ la fino de septembro. Atinginte Ŝanhajon li tuj vizitis mian hejmon por renkonti min. Sed matene, posttagmeze kaj vespere li ne vidis min hejmreveni. La sekvantan tagon li telefonis rekte al mia laborejo. Fakte ankaŭ mi sopiris vidi lin jam de multaj tagoj. Ekaŭdinte lian intiman kaj konatan voĉon, mi deziregis tuj vidi lin, sed memorante ke en la vespero estos kunveno, mi diris al li ke mi hodiaŭ ne havos libertempon. Poste ni tamen intervidiĝis ĉar la sekretario de la partifilio kaj la estro de la kompartia grupo forpermesis kaj devigis min hejmreveni. Ekvidinte lin, mi sentis en mi bedaŭregon. Sed kiam mi parolis pri la produkta impeto en nia fabriko, li tute komprenis min eĉ kun eksciteco. Vidante mian honteman





rideton, li diris: "Mi tute komprenas vin. Vi estas estro de produkta brigado, tiel agi vi devas." Malofte ni intervidis, sed aŭdante liajn vortojn, mi sentis min pli feliĉa ol ke ni kune pasigus la tutan libertempon. Pli profundigis nia amo.

Ĉi-foje, la fianĉo denove proponis al mi geedziĝon. Kion mi devas fari? Mi estas jam 25-jara kaj li 30-jara, ambaŭ ne tre junaj. Sed nun mi lernas en Postlabora Industria Universitato, kiel mi daŭre lernu se mi ekhavas infanon post geedziĝo? Ĉu ne estas bone ankoraŭ iom prokrasti la pariĝon? Mi diris al li mian penson. Post momenta konsidero li diris, ke dum la periodo de nia socialisma konstruado, ĉiam intensaj estas nia laboro kaj lernado. Do ĝis kiam ni prokrastos la geedziĝon? Plie, la feliĉo de socialisma socio kaj tiu de nia propra vivo ja ne kontraŭstaras unu la alian. Post la geedziĝo, ni povos labori kaj lerni pli trankvile, ĉu ne? Prave li diris kaj fakte ankaŭ mi mem tiel pensis. Sed nun troviĝas multe da malfaciloj en mia lernado kaj mi devas koncentrigi mian energion por bone ellerni la lecionojn. Mi timas ke la geedziĝo kaj ekhavo de infano malhelpos mian lernon. Mi diris tion al li kaj rakontis al li pri mia lernado.

Mi naskiĝis en malriĉa familio de laboristo. Kiam mi estis 7-8 jara, vidante ke najbaraj infanoj ĝoje vizitas lernejon, ankaŭ mi petegis al panjo ke ŝi lasu min viziti lernejon. Sed kiel ni malriĉuloj povis viziti lernejon? Kiam mi estis 13-jara mi trovis




laboron surkudri butonojn en iu fabriko. Tiam ree vekigis mia bela revo. Mi pensis, ke se mi ŝparos iom post iom la monerojn kiujn mi gajnis per butonfiksado, ĉu mi ne povos pagi la lernokoston? Ĉiutage de frumateno ĝis vespero mi laboris super butonoj, mi ne matenmanĝis kaj elspezis eĉ ne unu groŝon. Sed iutage, vidante ke miaj familianoj ĉiuj ĉagreniĝis antaŭ la malplena kaldrono, mi devis doni mian ŝparmonon vole nevole por aĉeti rizon. En la malnova socio regate de la ekspluatantaro, ni infanoj de laboristoj havis nek manĝaĵon nek vestaĵon, kompreneble ankaŭ ne lernopagon, kiel do ni povus viziti lernejon?

Post la Liberiĝo, la malbenata ekspluata sistemo estas renversita. La vivo de ni laboristoj pliboniĝas tagon post tago. Kaj nur tiam efektiviĝis mia deziro de kleriĝo. Komence mi lernis en elementa kurso kaj poste en la Liberhora Lernejo de laboristoj en nia fabriko. Tia estas la socialisma socio, kiu havigis al ni ne nur ŝancon de laboro, sed ankaŭ ŝancon de lernado.

En 1960 fondiĝis la Postlabora Industria Universitato en nia urbo kaj mi fariĝis unu el ĝiaj unuaj gestudentoj. Patro diris al mi: "Mi ne povis viziti eĉ elementan lernejon. Sed nun en nia familio estas jam du studentinoj inkluzive vian fratinton kiu lernas en la Unua Medicina Instituto. Vi ne vanigu la edukon de la Partio." Ankaŭ la gvidantaj k-doĵ kaj gelaboristoj de nia fabriko kuraĝigis min ke mi lernu bone kaj senĝene. Kaj la sekretario de la partia filio de nia laborejo plurfoje diris al mi: "Ankaŭ la lerno estas por produkto. Rigardu la lernon kiel taskon asignatan de la partio kaj bone ĝin plenumu!" Dum la inaŭgura soleno de la Universitato, iu gvidanta kamarado rakontis al ni, kiel revoluciaj veteranoj diligente lernis en la Rezistmilita Universitato en Jan'an. Kaj li esperas ke ni lernu de la revoluciaj veteranoj, konkeru malfacilojn por fari nin intelektuloj de la laborista klaso, akiru por ĝi honoron kaj prenu sur nin la gravan taskon modernigi la patruon. Aŭdinte lian parolon, mia koro estis ege ekscitita. Mi ekkomprenis ke nia lerno koncernas la problemon ĉu ni povas bone mastrumi kaj konstrui la patruon moderna. Nature, estas malfacilaĵoj en nia lernado kaj grimado al la pinto de sciencoj kaj tekniko. Sed certe ni venkos per persisteco tiujn malfacilojn kaj malhelpojn sur la vojo sur kiu ni antaŭenmarŝas. Lerno, jen la plej grava tasko por mi nuntempe. Kaj estos ne grave se ni iom pli prokrastos nian geedziĝon. . .

Mi parolis malrapide kaj li aŭskultis silente ŝajne kun profunda emocio. Poste li diris: "Jes, granda estas la tasko sur la ŝultroj de nia laborista klaso. Ne decas malhelpi vian nuntempan intensan lernadon per geedziĝo." Post interkonsiliĝo, fine ni decidis ke la geedziĝo estu prokrastata ĝis post mia diplomiĝo el la Universitato.

# Filmo Rolita de Strigo



*En ĉiu nokto, ĉiu strigo povas mortigi 2-3 talpojn, kaj ĉiu talpo konsumas ĉ. 3 kilogramojn da greno en ĉiu jaro. Do ĉiu strigo povas ŝparigi al ni ĉ. 2500 kilogramojn da greno ĉiujare.*

*Fotoj de Giang Vej*



**K**IEL bestoj ludas siajn rolojn en filmoj? Tion oni vidas tre malofte. Antaŭ nelonge mi ĝuis viziton al la Ŝanhaja Farejo de Sciencedukaj Filmoj, kie oni estis farantaj la filmon «Mal-kvieta Nokto», kies ĉefrolulo estas strigo.

Enirinte la fotografan pavilonon, mi vidis ke tie estis aranĝita nokta sceno de kamparo lumigita de la luno: tie kaj tie estas vojetoj kaj vicoj de rizplantoj, silento regas sur la vasta tero. Sed kiam eklumis la hidrargo-

lampoj, oni tuj vidis strigon sidantan sur arbobranĉo. Kun du starigitaj plumetoj sur la kapo ĝi fikse rigardadas la talpon kiu manĝas restajn rizospikojn. . . . . Streĉa batalo inter ili komenciĝis. Juki, vicedestro de la filmfarejo, estas la reĝisoro de la filmo. Por fotografi la scenon de la momento kiam la strigo sin ĵetas sur la talpon, li jam atendis ĉi-tie kelkajn noktojn kune kun la fotografisto.

La strigo, laŭ ĉina tradicia opinio, estas birdo malfeliĉiga.

En antikvaj klasikaĵoj kaj fabeloj, ĝi estas priskribata kiel birdo malbona. Sed post esplorado de la Ĉina Akademio de Sciencoj, oni trovis la strigon utila birdo kiu ekstermas talpojn malutilajn al la kamparanoj. Por ke ĉiuj bone konu ĝin, la filmfarejo starigis por si la taskon speciale fari ĉi tiun filmon. Sed kiel instrui la strigon ludi sian rolon, ke ĝi bone prezentadu la spektaklon de lerta talpokaptado? Por tio, Juki kaj la fotografisto tranoktis sur monto kaj eniris arbaron meznokte por observi tie la vivmanieron de strigoj kaj dum la fotografado ili elpensis multajn interesajn metodojn. Juki diris al mi, ke estus sufiĉe iri al la kampoj, se oni volus nur fotografi kelkajn simplajn agojn de la strigo por sugestado. Tamen, filmo celanta popularigon de sciencaj scioj postulas cetere ke la vivmaniero de la strigo, precipe la tuta procezo de kaptado kaj manĝado de talpo, estu vere kaj detale montrita, kio ne estas plenumbla en la naturo. Por fari tion, oni povas nur "inviti" la strigon en la pavilonon por ludi ĝian rolon.


La strigo al kutimiĝis al la nokta vivo kaj timas fortajn lumon, sonon kaj homon. La homaj voĉoj en la fotografa pavilono kaj la intensa lumo de hidrargolampoj estas kontraŭ ĝia vivkutimo, tial grandaj malfaciloj estis spertitaj dum la fotografado.

En la vintro de 1961, oni kaptis por la filmfarado pli ol 20 strigojn, sed kiam la grupo de birdaktoroj venis en la novajn cirkonstancojn, ilin tuj kaptis granda timo kaj ili aŭ ĉien flugis aŭ restis senmovaj, tial do neniu sceno povis esti fotografata.

Oni komencis trejni ilin kun pacienco. Apud trairejo multe



paŝobrua en la filmfarejo, oni konstruigis dometon por ili, en kiu estis starigitaj kelkaj ŝatataj de ili pinglarboj. Oni ofte iris tien por ilin rigardi, tiel ke oni povis unuflanke koni ilian vivon kaj aliflanke alkutimigi ilin al homoj. Poste, elektraĵoj lampoj estis instalitaj en la dometo kaj la lumo estis laŭgrade intensigita—de 40 kandeloj ĝis 4,000 kandeloj. Post jaro da trejnado, la strigoj iom post iom alkutimiĝis al la novaj cirkonstancoj, kaj ili jam povis manĝi talpojn sub forta lumo dum ĉeesto de homoj. Iufoje, ili eĉ povis flugi malsupren por kapti talpojn ĝuste kiel ili kutimas sur la kampoj.



*La strigo ĉasanta ruzajn talpojn.*

Sed la translokiĝo el la dometo en la fotografan pavilonon signifis eniri novan cirkonstancon. Tie, la strigoj tuj sin kaŝis en la branĉoj ĉe la plej eta sono kaj sidis senmovaj rigardante ĉirkaŭen. Oni tiam transformis la dometon en fermitan fotografejon. La reĝisoro kaj la fotografisto laboris ekster ĝi rigardante tra vitraj fenestroj kaj instalis sonizolilon en la filmfotilo, por ke la strigo faru prezentadon senĝene. Post kelkaj tagoj, ŝajnis ke ili jam alkutimiĝis al sia nova loĝejo, kaj oni tiam metis talpojn sur la rizkampon en la pavilono dum la tempo de vespermanĝo, por ke la strigo ilin kaptu kaj manĝu. La reĝisoro kaj la fotografisto atendis observante ĉe la fenestro por foti kiam la strigo sin ĵetis malsupren. Tiamaniere, ili atendis kelkajn tagojn, kaj iufoje eĉ atendis ĝis profunda nokto, por kapti scenon kontentigan. Post multaj maldormaj noktoj, ili fine sukcesis filmigi la plej interesan scenon, en kiu la strigo kaptis per siaj akraj ungoj la talpon, rompis ĝian kolon, trinkis la sangon kaj elmanĝis la tutan karnon kun la haŭto. Por kompletigi la filmon, nun ili klopodas foti la scenon kiel la strigo plonĝkaptas la talpon per la ungoj, kaj baldaŭ oni jam povos ĝui la filmon en kinejoj.



*Ĉiunokte, la strigo gardas la talpojn.*

*Talpo ŝtelmanĝanta fabojn.*



# Ankaŭ Orfoj Vivas Feliĉe

**E**N la urbo Ŝenjang de nord-orienta Ĉinio, ĉe Ĝenhing-strato de la Paco-kvartalo loĝas familio de ses georfoj. Ĉio en la ĉambro estas en bona ordo, sur la muroj vidiĝas koloraj bildoj, en la lito estas novaj kovriloj, kaj sur la tableto ĉemura estas pelvo da fruktoj. Ilia najbaro Onjo Kang ĝoje diris al aliaj: "Se estus antaŭ la Liberiĝo, ĉi tiuj ses georfoj certe mortus pro malsato aŭ frosto. Sed bonan sorton ili havas ke hodiaŭ ili ĝuas feliĉajn tagojn!"

Ambaŭ iliaj gepatroj mortis pro gravaj malsanoj. La perdiĝo de la gepatroj alportis al la ses junaj animoj grandegan malĝojon. Ili ne sciis kion fari en la estonteco. Tamen en la socialisma nova Ĉinio, se iu familio renkontas malfacilaĵon, ĉiuj helpas. La Ŝenjang-a Elektra Administracio en kiu laboris ilia patro antaŭ sia morto, la popola komunumo al kiu ili apartenas kaj la najbaroj, ĉiuj helpas la infanojn aranĝi la vivon.

La Administracio ne nur donis al la georfoj monhelpon, sed ankaŭ laŭperiode donadas al ili subvencion, sendis la plejaĝan fratinnon el ili, la 16-jaran Jang Gingmej lerni teknikon, kaj aliajn tri infanojn kun aĝoj de pli ol sep jaroj en lernejon. Ankaŭ la popola komunumo donas al ili monhelpon ĉiumonate. Kiam vintro alvenas, la popola komunumo liveras ŝtofon kaj kotonon por prepari vestojn kaj litajojn por la infanoj. Ĝi eĉ difinis specialan


laboranton ofte viziti la hejmon de la georfoj por helpi ilin solvi malfacilojn. La ĉefo de la Loĝantara Komitato kunvokis specialan kunsidon, por helpi al la infanoj zorgi la vivon. Ilia najbaro Onjo Kang estas tre fervora, ŝi promesis prizorgi la ĉiutagan vivon de la infanoj. Kiam iliaj gepatroj vivis malsanaj, ŝi jam multe helpis tiun familion, kaj post la morto de la gepatroj, ŝi traktas la infanojn kiel siajn proprajn gefilojn. La infanoj petis ŝin zorgi ilian monon kaj ilian ĉiutagan vivon, ŝi do mastrumas tiun familion kiel patrino. Ŝi helpas la infanojn hejti fornĉon, prepari manĝon, ordigi la ĉambrojn ktp. Somere, ŝi disŝprucigas fluidan medikamenton en ilia ĉambro por mortigi moski-

tojn. Kiam malvarmiĝas, ŝi atentigas ilin fermi la pordon kaj la fenestrojn. Kiam iliaj vestoj difektiĝis, ŝi fliktas ilin, kaj kiam la litajoj malpuriĝis, ŝi lavas ilin.

En la pasinta jaro, la najbaraj onkloj faris por la ses infanoj dek kvar novajn vestojn por somero kaj vintro; ili ankaŭ donacis al ili ĉapojn, ŝuojn kaj ŝtrumpojn. Tiel la ses georfoj estas bone vestitaj.

La ĉefo de la virina komitato multe zorgas pri la lernado de la infanoj. Ŝi ofte venas por kontroli la ekzercojn de la infanoj. Ili lernas tre bone, kaj fariĝis distingindaj lernantoj. Iu popola policano ofte vizitas la hejmon de la georfoj, helpas ilin aĉetiri rizon kaj karbon, disŝpliti lignopecojn por hejti fornĉon. Li ankaŭ alterne surdorse portas la du plej junajn infanojn al la barbiro.

Ĉiuj najbaroj rigardas ilin kiel la dua generacio de la patrio. La georfoj ja havas ĉie intimulojn.



*Ilustraĵoj de Ĉen Ŝivej*





*Fruktopleto*

**Zilan Sisu:**

## Lakobjektoj de Jangĝoŭ

**N**E pensu, ke per lako oni povas nur ŝmiri pordojn, fenestrojn, tablojn, seĝojn kaj aliajn meblojn. En Ĉinio, lertaj metiartistoj povas krei per ĝi senkompare belajn artaĵojn kun alta artvaloru. Jangĝoŭ estas unu el la produktaj centroj de tiaj metiartaĵoj.

La ĉefaj produktajtoj de lakobjektoj de Jangĝoŭ estas ekranoj, ŝrankoj k.s. kaj skribilaroj, cigareda fumilaro, te-skatoj kaj aliaj diversaj malgrandaj surtablaj ornamajtoj. Iliaj karakterizajtoj estas glateco, delikateco, malpezeco kaj fortikeco por longa uzado, kaj iliaj koloroj ne perdiĝas kun la paso de la tempo, sed fariĝas ĉiam pli brilaj. Komplika estas ilia procedo de fabrikado, unu produktajto ordinare bezonas trapasi kelkdek laborprocedojn, kaj iaj produktajtoj (ekzemple ekrano) bezonas ĉirkaŭ tutan jaron por finfariĝo.

Laŭ fabrika metodo lakobjektoj ĝenerale estas dividitaj en du kategoriojn — tiun kun ligna internaĵo kaj tiun sen internaĵo. Por produkti tiun de la unua speco oni alŝmiras lakon sur lignan objekton kaj tiun metodon oni aplikas plejparte en farado de grandaj mebloj. Por produkti lakobjekton de la dua kategorio, oni unue faras lignan internaĵon por surporti la alŝmirotan lakon kaj poste forigas la lignan internaĵon. La ŝmiradon oni faras fojon post fojo, ofte je dekoj — eĉ je centoj da fojoj por ke la tavoloj fariĝu sufiĉe dika. Kiam la tavoloj estas sekiĝinta en sensuna loko, oni komencas ĝin prilabori. La

ordinaraj etaj objektoj estas plejparte faritaj per tiu ĉi metodo.

La maniero de beligo de lakaj objektoj el la tria jarcento a.K. ĝis la tria jarcento, estas plejparte en desegnado en 1 koloro. De la sepa jarcento ĝis la deka, oni komencis apliki la metodon de inkrustado per oraj aŭ arĝentaj pecetoj kaj skulptado de sekiĝinta lako. La lakobjektoj de Jangĝoŭ heredis ĉi tiun tradician metian teknikon, kaj plivariigis plue la materialon por inkrustado, nome, krom oraj kaj arĝentaj pecetoj, oni uzas ankaŭ gemon, juvelon, koralon, smeraldon, kristalon, eburon kalambakon (*arbo aquilaria agallocha*) kaj aliajn kiel materialon. La metodoj de inkrustado kaj skulptado ofte estas kune aplikataj al sama prilaborajo.

En inkrustado oni alfiksis koloran materialon subtile faritan sur la lakan gravuritan desegnon. En elekto de materialo kaj skulptado kaj polurado oni devas atenti pri la koloro kaj solideco de garnomaterialo, por ke tiu konformu al la koloroj kaj formoj bezonataj de la desegnaĵo. Por iuj grandaj lakartaĵoj oni uzas materialon de pli ol cent specoj en inkrustado. Tiaj lakartaĵoj, garnitaj per altvaloraj materialoj, povas esti konservataj por tre longa tempo.

La arto lakogravuro estas farado de desegnaĵo per grifelo sur lakobjekto kun ligna internaĵo aŭ sen internaĵo. Ifoje oni post la gravuro de desegnaĵo pleniĝas la gravuritajn lokojn per lako kun diversaj aliaj koloroj, por reliefigi la desegnaĵon kaj pliibeligi ĝin per pompa kolorvarieco. Ankoraŭ alia procedo estas fari desegnaĵon per kolora lako, poste per speciala

*Fald-ekrano*





tranĉilo fortranĉi la koloran lakon laŭlonge de la konturo de la desegnaĵo, eltranĉante liniojn, kaj plenigi tiujn eltranĉitajn kavajojn per ora pulvoro. Tio donas multan ornaman efikon, kaj faras la produktajojn eksterordinare ravaj.

Ĉar la metiartistoj de lakobjektoj el Jangĝoŭ posedas majstrecon en sia tekniko, scipovas lerte manipuli la laborilojn kaj prilabori la materialon, tial ĉiu ilia produktaĵo estas senescepte altkvalita artaĵo. La inkrustajoj havas helajn harmoniajn kolorojn sen ia signo de kunmetiteco; kaj la gravurajoj estas faritaj kun konvena profundeco por sentigi la reliefon de la bildo kaj kun klara kontrasto inter helo kaj malhelo. La lakobjektoj de Jangĝoŭ rikoltis admiron de multaj artistoj kaj plurfoje gajnis premiojn ĉe diversaj ekspozicioj. La legantoj povas iom gustumi la belecon de Jangĝoŭa lakproduktaĵo el la aldonita foto. Ĝi prezentas sesfaldan ekranegon. La formato de la faldaĵo estas 2 x 0.5 m. kaj la ses faldaĵoj kune formas unu grandan bildon "Paca Printempo". En la bildo rekte staras freŝe verda pino, pompe floras peonioj, pendas grapoloj de gracia rampantaj glicineoj, kaj ĉarmas

magnolioj, karakterizataj per pureco kaj delikateco. En tia sunplena, belega vetero kaj en tiu ĝardeno kun diversaj floroj konkurantaj inter si pri beleco estas amaso da kolomboj el kiuj iuj flugas kun etenditaj flugiloj, aliaj sin intervokas, triaj fikse rigardas, kvaraj aŭskultas kun atento, ĉiuj havas malsamajn teniĝojn kaj apartajn esprimojn. La bildo ne nur manifestas okulfrapan vervan vivĝojn, sed ankaŭ sentigas pacon kaj feliĉon. La interna kadro de la ekrano estas el desegno de returnspiralaĵo kaj la ekstera el figuroj de drakoparoj plenaj de naciaj koloroj, tiel ke la bildo aspektas pli eleganta kaj pompa.

En la pasinteco, la artplenaj lakobjektoj de Jangĝoŭ estis farataj sole per la manoj de metiartistoj, sed nun, iuj produktaj procedoj jam estas plenumataj mekanike. Krome, oni jam organizis laborkoopervativon, kaj establis fabrikon kun pli ol kvincent laborantoj. Kaj la ŝtato solvis por ili la malfacilaĵojn rilate al kapitalo, materialo kaj vendado, tial la lakobjektoj de Jangĝoŭ ne nur daŭre evoluigas la nacian artan tradicion, sed ankaŭ ĝia produktokvanto multe superas tiujn de ĉiuj pasintaj tempoj.

Fald-ekrano: Paca Printempo



KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \*

### MILJARAJ BUDHISMAJ KLASIKAJĴOJ BONE KONSERVATAJ

Pli ol 3,100 volumoj da raraj budhismaj klasikajĴoj inkluzive manuskriptojn kaj presaĵojn trovitaj en Junnan-provinco ricevis

bonan zorgon. Oni klasifikis ilin kaj faris por ili katalogon. La plej fruaj manuskriptoj estas skribitaj en 894 p.K.

Tiuj budhismaj klasikajĴoj apartenas al baj-nacio. Antaŭe ili konserviĝis en prapatra templo de

Tung-familio en Tali-a Baj-nacia Aŭtonoma Sub-provinco. Nun por pli bone ilin protekti kontraŭ mal-sekeco, polvo kaj insektoj kaj por ilin studi oni ilin translokigis al kultura instituto de la aŭtonoma subprovinco.



# Ŝanhaja Marista Klubo

**K**IAM la vespera suno ruĝigas la blankajn nubojn kaj sur Huangpu-rivero ekaperis koloro-riĉa pejzaĝo, oni ekvidas sur domego ĉe la verdigita riverbordo la blazonon el ruĝa ankro kaj helblua mevo konturita per neonlumo, kiu milde brilas al la larĝa torento de Huangpu-rivero kaj salutas al la marŝipoj alveturantaj de malproksimaj lokoj. Jen estas la Ŝanhaja Marista Klubo.

Antaŭ pli ol 50 jaroj, laboristoj de nia lando konstruis tie la luksan domegon per siaj diligentaj manoj, sed ĝi estis okupata de anglaj imperiistoj.

Sed nun, maristoj el diversaj landoj junaj kaj maljunaj kune sidas en la klubo kun malsamaj haŭtkoloroj. Eble ili neniam interkonatiĝis antaŭe, sed nun ili kune aŭskultas la belan muzikon kaj amike konversacias kiel malnovaj amikoj.

Jen maljuna dana maristo rigardas ĉirkaŭ si per la brilantaj okuloj kaj diras signifoplene: "Kiel granda ŝanĝiĝo! En la pasinteco la kajoj de Ŝanhajo estis kaj malpuraj kaj difektitaj. La portistoj ĉifone vestitaj portis pezajn kestojn al la ŝipoj sur tre mallarĝaj, balanciĝantaj tabuloj. Sed nun la kajolaboristoj, alte sidante, direktas arganojn kun longa brako. Multaj junulinoj lerte veturigas akumulatorajn ĉarojn tien kaj reen." Kun ĉiam pli kreskanta emocio li konkludis: "Kiom zorgeme la registaro de la nova Ĉinio priatentas la vivon de la laboristoj! . . ."

"Belegaj estas la marŝipoj fabrikitaj de Ĉinio!" entuziasme laŭdas iu ĉilia maristo. "Ĉifoje en la haveno Aleksandro de la Unuigita Araba Respubliko mi vidis

grandan marŝipon kun ĉina standardo. . . ."

"Ankaŭ ni renkontis tute novan ĉinan marŝipon en indonezia haveno. Ni ĝoje fajfis, kaj ankaŭ la ĉinaj maristoj salutis nin per fajfo," vikle rakontas greka maristo.

Subite, la rigardoj de la maristoj ekturnas sin al iu ĉina ŝipestro, kiu venas en neta uniformo, konversaciante kun maroka maristo.

"Fiero! Ni sentas fieron por la stariĝinta ĉina popolo," iu diras kaj paro da grandaj manoj forte ekpremas la manojn de la ĉina ŝipestro. Sekvas dua kaj tria

paroj da manoj por firme ilin premi.


La maljuna dana maristo verŝas en sian pokalon la densan kaj aroman vinon, solene stariĝas kaj laŭte diras al la ĉina ŝipestro: "Ni trinku por nia amikeco, por prospero de Ĉinio!" Kaj ĉiuj elsekigas sian tason per sola engluto.

Jes, adiaŭante, ne malmultaj maristoj sentas malfacilon por foriri kaj multaj donacas al la Marista Klubo sian plej amatan objekton por rememoro. En la ĉambro de donacaĵoj de eksterlandaj maristoj estas ekspoziciataj multe da altvaloraj donacaĵoj. Ĉiuj tiuj rememoraĵoj portas en si profundan amikecon.

*Supre: Ĉinaj kaj francaj maristoj en la trinkejo de la klubo.*

*Sube: Ĉinaj kaj sovetiaj maristoj ŝakludas.*

*Fotoj de Ĝeng Guanghua*



ŜI NAJ-AN

La jena rakonto "Gingjang-monteĝo" estas brila fragmento el la ĉina klasika romano "Ĉe la Akvorando", verkita, laŭ onidiro, de Ŝi Naj-an (1296-1370 p.K.) en Ming-dinastio. Tiu romano, temanta pri kamparana revolucio, realisme priskribis la leviĝon ĉe Liangŝanbo sub la gvido de Song Giang en Suda Song-dinastio (1127-1279 p. K.). Ĝi malkaŝis la despotan kruelecon kaj putrecon de la reganta feŭda klaso, vivece klarigis la veron, ke la popolo ekribelas devigate de la regantaro, kaj entuziasme prikantis la heroojn en la leviĝo. Kaj Vu Song, kiu batmortigis tigron sur Gingjang-monteĝo, estas unu el la 108 bravegaj viroj de Liangŝanbo kaj unu el la ĉefaj roluloj de la romano. Heredante kaj plue disvolvante la brilan tradicion de la popola literaturo, la romano sukcesis krei vivecajn kaj elstarajn karakterojn, kaj ĝi havis tre grandan influon al la sekvantaj generacioj.

— La Red.

VU Song iris survoje kelkajn tagojn kaj alvenis al la distrikto de Janggu-gubernio. Kiam li estis ankoraŭ malproksime de la guberniurbo, iutage en la tagmezo, li eksentis malsaton kaj soifon post irado. Li vidis antaŭ si drinkejon kun vinflago flirtanta antaŭ la pordo. Sur la flago estis skribitaj kvin ideografiaĵoj, kiuj legiĝis: "Post Tri Bovloj Vi Ne Povas Transpasi la Monteĝon."

Vu Song eniris kaj sidiĝis. Li metis sian klabon kontraŭ la muron kaj ekkriis: "Mastro, tuj donu al mi vinon por drinki!" Tiam la drinkejmastro alportis tri bovlojn, paron da manĝbastonetoj kaj teleron da varma legomaĵo, metis ilin antaŭ Vu Song kaj elverŝis por li plenan bovlon da vino. Vu Song levis la bovlon, eldrinkis la vinon je unu gluto, kaj li kriis: "Kiel forta estas la vino! Mastro, se vi havas ion por satigi, mi aĉetu iom por manĝi kun la vino."

La drinkejmastro diris: "Nur kuiritan bovaĵon."

Vu Song diris: "Bone, detranĉu du aŭ tri ĝinojn por manĝi kun la vino."

La drinkejmastro iris en la internan ĉambron, dispecigis du ĝinojn da kuirita bovaĵo, ĝin alportis en plado kaj metis antaŭ Vu Song kaj tuj elverŝis alian bovlon da vino. Eldrinkinte ĝin Vu Song diris: "Bona vino!" Kaj la homo elverŝis ankoraŭ unu bovlon. Kiam Vu Song estis drinkinta tri bovlojn, la homo ne plu venis doni vinon. Vu Song frapis la tablon kaj ekkriis: "Mastro, kial vi ne venas doni al mi vinon?"

La mastro respondis: "Sinjoro gasto, se vi volas pli da viando, tion mi alportos al vi."

Vu Song diris: "Mi volas ankaŭ vinon. Sed ankaŭ detranĉu por mi iom da viando."

La mastro diris: "Viandon mi detranĉos kaj alportos al Sinjoro gasto. Sed pli da vino mi ne donos."

Vu Song diris: "Jen strangajo!" Kaj li demandis la mastron: "Kial vi ne volas vendi vinon al mi por drinki?"

La drinkejmastro respondis: "Sinjoro gasto, vidu ke sur la anoncflago ĉe mia pordo estas klare skribite: 'Post Tri Bovloj Vi Ne Povas Transpasi la Monteĝon'."


Vu Song diris: "Kion signifas 'Post Tri Bovloj Vi Ne Povas Transpasi la Monteĝon'?"

La mastro diris: "Nia vino, kvankam vilaĝa vino, tamen havas la guston kaj forton de malnova vino; kiu ajn gasto veninta al mia gastejo, drinkinte










## PEJZAĜO

*En ĉielruĝ' ripozas la ondaro,  
Mirindas la lagbildo de sereno;  
Ĉe l' balustrad' mi sentas en solstaro,  
Ke vere mi min trovas en edeno.*

Poemo kaj pentraĵo de Tang Jin

*Tang Jin (1470—1523 p.K.), alinome Bohu kaj Liuĵu, naskita en Vu-gubernio en nuna Ĝiansu-provinco, fama kaj talenta pentristo en Ming-dinastio (1368—1644 p.K.). Li vere majstris la ĉinan pentrarton en ĉiuj branĉoj, ekz-e pajzaĝoj, homoj, birdoj kaj floroj. Liaj verkoj karakteriziĝas per eleganteco, delikateco kaj gustoriĉeco. Krom pentrado, li atingis altegan nivelon ankaŭ en skriboarto kaj poezio kaj estis tre fame konata en sia tempo kiel unu el la Kvar Majstroj de Ming-dinastio.*





Elektra irigacia centralo de la Dongĝen-a Popolkomunumo en Venhi-gubernio, Ŝanhi-provinco.

*Foto de Dong Jongkuj*

La Hiaŭfan-a Triŝ en Jonggi-gubernio akvon el la Flava pli ol 2600 hektaro

Irigacia kanalo en montregiono de Ĝugi-gubernio, Ĝegiang-provinco.




Elektra pumpstacio de la Ĉengbej-a Popolkomunumo sude de Ŝanhajo.

Foto de Tang Junĵen

Rivera barajo en Ĝugi-gubernio, Ĝe-giang-provinco. Ĝi kapablas rezervi 320.000 kubmetrojn da akvo kaj irigacii 900 hektarojn da kampoj. Sur riveroj en la gubernio estas multe da tiaj simplaj kaj rapidefikaj konstruaĵoj.


Foto de Gu Songnian



Ŝtupa Elektro-irigacia Centralo en Ĝugi-gubernio, Ŝanhi-provinco, kiu ĉerpas akvon de la Rivero kaj kapablas irigacii 900 hektarojn da kampoj.

Foto de Gu Songnian

Foto de Gu Songnian







紅霞灩灩碧波平  
晴色湖光盡不收  
臨園千榭獨倚危明  
自是秋登灑吳郡  
唐高



輕帆風送遠湖平  
望猶難目與成  
識得倚欄人言  
矣沈心聊且俯  
澄瀛荒村寒樹  
野橋平別有  
疎軒駕嶺成  
自是遠離塵俗地  
畫家何乃羨  
登灑

己亥仲秋浩气






## Donacoj por Abonantoj kaj Varbantoj

Al ĉiu EPĈ-abonanto kiu ensendas sian abonon por 1964 antaŭ la 1-a de feb., 1964 ni donacos kalendaron de 1964 kun 24 belaj ĉinstilaj pentraĵoj kolore presitaj.

Tiu, kiu sukcesis varbi por EPĈ 2 novajn abonantojn, ricevos brokatan bildon el vera silko.



*Tian-anmen de Pekino, (kolora brokato), formato 19 cm. × 29.5 cm.*

BV. ABONI EPĈ-N PER LA ALDONITA ABONILO

### Libroservo de Ĉina Esperanto-Ligo

P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio





紅霞灑灑碧波平  
晴色湖光盡不收  
此際陶子能獨倚  
分明自是賦登瀛  
吳郡唐寅



輕帆風送遠湖平  
望猶難目與成  
識得倚欄人  
意矣沈心聊且  
倚澄瀛荒村寒  
樹野橋平別有  
疎軒駕嶺成自  
是遠離塵俗地  
畫家何乃羨登瀛

己亥仲秋唐魁



~~~~~




1964

*Tablo-kalendaro en Esperanto,  
formato 17.5 cm. × 25 cm.*

## Donacoj por Abonantoj kaj Varbantoj

Al ĉiu EPC-abonanto kiu ensendas sian abonon por 1964 antaŭ la 1-a de feb., 1964 ni donacos kalendaron de 1964 kun 24 belaj ĉinstilaj pentraĵoj kolore presitaj.

Tiu, kiu sukcesis varbi por EPC 2 novajn abonantojn, ricevos brokatan bildon el vera silko.



*Tian-anmen de Pekino, (kolora brokato), formato  
19 cm. × 29.5 cm.*

BV. ABONI EPC-N PER LA ALDONITA ABONILO

### Libroservo de Ĉina Esperanto-Ligo

P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio



# La Disvolviganta Elektro-irigacio de Ĉinio

Ĉinio estas lando kun vasta teritorio kaj pli ol kvincent milionoj da kamparanoj, pro tio la agrikulturo nature formas la fundamenton de la nacia ekonomio. Depost la fondiĝo de la lando, la ŝtato ĉiam metas plej grandan zorgon sur la agrikulturon, konstruis multajn akvokonservajn kaj irigaciajn konstruaĵojn grandajn kaj malgrandajn en diversaj lokoj, kiuj forte garantias la agrikulturan produktadon. Post la tutlanda popolkomunumigo, la kamparanoj, sub la gvido de la ŝtato kaj per la propra forto, rapide disvolvas la akvoutiligajn konstruadojn servantan rekte al la agrikulturo. Por plena utiligo de la ekzistantaj akvokonservaj konstruaĵoj, oni konstruis pli multe da irigaciaj kanaloj. Ekde 1959-1962 kontinue okazis senprecedence seriozaj sekegoj tra la tuta Ĉinio, kaj tiuj konstruaĵoj ludis gravan rolon.

Ekde la lasta jaro, sub la ŝtata alvoko de tutforta subteno al agrikulturo, la elektro-irigacio en nia lando ankaŭ multe progresis. La ĉina agrikulturo faris novan paŝon al mekanikigo. Tie ĉi ni povas prezenti al niaj legantoj nur kelkajn facetojn pri la grandaj ŝanĝiĝoj. En la venontaj n-roj ni daŭre prezentos al la legantoj pri tiu temo.


La Gegong-a Popolkomunumo en montregiono de Tang-gubernio, Hebej-provinco, muntas alttensiajn elektrofadenojn por irigacii teras-kampojn surmontajn per akvo de Tang-rivero.

*Foto de Ĝou Fugan*



La Hjuankiaŭ-a Popolkomunumo sude de Ŝanhajo riparis irigacian kanalon.

*Foto de Tang Junjen*





*Foto de Jang Binven*

Riĉa rikolta de tritiko dank' al starigo de pli bona irigacia sistemo.

*Foto de Ding Gjun*





tri bovlojn, ebrigaŝ kaj ne povas transpasi la antaŭstarantan monteĝon, jen kial la diro 'Post Tri Bovloj Vi Ne Povas Transpasi la Monteĝon'. Kiam venas preterpasanta gasto, li drinkas nur tri bovlojn kaj ne petas plu."

Vu Song ridis kaj diris: "Estas tiel! Sed kial mi, drinkinte tri bovlojn, ne ebrias?"

La mastro diris: "Mia vino estas nomata 'Aromo Botelpenetra'. Ĝi estas ankaŭ nomata 'Falo Eksterporda'. Kiam ĝi estas enbuŝigita, ĝi gustas tre bone kaj plaĉe, sed post momento ĝi faligas la drinkinton ebria."

Vu Song diris: "Ne babilaĉu! Ĉu mi ne pagos al vi? Versu tri bovlojn pli al mi por drinki!". . . . Vu Song drinkis sume dek ok bovlojn. . . . Li prenis sian klabon kaj ekiris.

La mastro rapide eliris post li kaj kriis: "Sinjoro gasto, kien vi iras?"

Vu Song haltis kaj demandis: "Kial vi vokas min? Mi ja ne ŝuldas al vi monon por la vino, kial do vi vokas min?"

La mastro kriis: "Mi intencas bonon. Revenu en mian domon kaj vidu kopion de anonco de la magistrato ĉi tie."

Vu Song demandis: "Kia anonco?"

La trinkejmastro respondis: "Lastatempe sur la antaŭstaranta Gingjang-monteĝo sin trovas granda tigro kun elstaraj okuloj kaj blanka frunto, kiu elvenas nokte por ataki homojn kaj jam mortigis du-tridek fortulojn. Tial la magistrato ordonis, ke la ĉasistoj ĝin kaptu por dispono antaŭ difinita limdato, alie ili ricevos bastonadon. Ĉe ĉiuj vojkrucoj kondukantaj al la monteĝo estas anoncoj por averti la preterpasantajjn vojaĝantojn, ke ili transiru la monteĝon nur en grupoj de la 9-a atm. ĝis la 3-a ptm.. Dum la aliaj horoj al neniu estas permesite transiri la monteĝon. Kaj precipe la unuopaj vojaĝantoj nepre atendu ĝis aliaj venos por ke ili iru kune. Nun jam finiĝas la 3-a horo ptm. kaj mi vidis ke vi ekiris sen informiĝo de aliaj, kio ja signifas senutilan riskon de via vivo. Estus pli bone se vi pasigus la nokton ĉi tie ĉe mi kaj atendu ĝis morgaŭ kiam du-tridek homoj estos kolektiĝintaj kaj vi povos kune transpasi la monteĝon."

Tion aŭdinte Vu Song ekridis kaj diris: "Mi estas homo el Kinghe-gubernio. Tiun ĉi Gingjang-monteĝon mi jam transpasis almenaŭ dek aŭ dudek fojojn, sed kiam mi aŭdis ke sin trovas sur ĝi tigro! Ne faru tian fiparolon por timigi min! Eĉ se sin trovas tigro, mi ne timus ĝin."

La mastro diris: "Mi bonvole intencas savi vin. Se vi ne kredas min, envenu kaj vidu la anoncon."



Vu Song diris: "Fermu vian buŝaĉon! Eĉ se efektive sin trovas tigro, tamen ĉi sinjora moŝto ĝin ne timus! Vi retenas min por loĝi ĉe vi. Ĉu vi intencas atenci mian vivon kaj rabi mian monon en la meznokto, kaj tial vi timigas min per fitigraĉo?"

La mastro diris: "Jen vidu! Bona estas mia volo, sed li prenas ĝin por malbona intenco kaj tion ĉi mi ricevas kiel dankon! Se vi ne kredas min, do iru laŭ via bontrovo."

Tiel parolante kaj kapskuante, li revenis en sian gastejon.

Kun sia klabo en mano Vu Song ekmarŝis grandpaŝe al la monteĝo. Kiam li jam iris kvar aŭ kvin liojn, li alvenis al la piedo de la monteĝo kaj tie li vidis grandan arbon. Peco de la arbŝelo estis forskrapita tiel ke montriĝis tie blanka ligno, sur kiu estis skribitaj du linioj da ideografiaĵoj. Kaj, Vu Song konis ne multe da vortoj. Li levis la kapon kaj legis jenon: "Ĉar lastatempe tigro atakas homojn sur la monteĝo, la preterpasantaj vojaĝantoj povas ĝin transpasi nur en grupoj dum la tempo de la 9-a atm. ĝis la 3-a ptm.. Ne endanĝerigu vin mem."

Leginte Vu Song diris ridante: "Tio ĉi estas artifiko de la drinkejmastro por timigi vojaĝantojn tiel ke ili iru al lia domo por tranokti. Sed kion malbenitan mi timu!" Kaj trenante la klabon, li surprénis la monteĝon.

Tiam estis malfrua posttagmezo. La ronda ruĝa suno estis malrapide subironta. Stimulite de la vino, Vu Song sentime iris antaŭen sur la monteĝon. Sed li iris malpli ol duonlion kiam li vidis kadukiĝintan templon de Montdio. Alveninte al la fronto de la templo li vidis ke sur la pordo de la templo estis algluita anonco kun oficiala sigelo. Vu Song haltis kaj legis sur ĝi:

*Anonco de Janggu-gubernio: Ĉar lastatempe aperis sur la monteĝo tigro kiu mortigis homojn, ĉiuj vilaĝestroj kaj ĉasistoj estas ordonitaj ĝin kapti antaŭ limdato por ne esti punataj per bastonado; tamen ĝi estas ankoraŭ ne kaptita. Se estas vojaĝantoj preterpasantaj, ili povas transpasi kune en grupoj de la 9-a atm. ĝis la 3-a ptm. En la aliaj horoj aŭ en unuopo oni ne transpasu la mon-*

teĝon, por ke ili ne risku sian vivon. Ĉiuj priatentu la averton.

Leginte la anoncon sigelitan Vu Song konvinkigis, ke efektive sin trovas tigro. Sed kiam li estis turniĝonta por reiri al la drinkejo, li pensis en si: "Se mi reirus, li mokus min kiel malbravulon, tion do mi ne povas fari." Li meditis momenton kaj diris: "Kion malbenindan mi timu! Mi tamen suriru kaj vidu kio okazos."

Kiam Vu Song estis piediranta, la vinforto komencis tajdi supren, li do puŝis sian feltan ĉapon post la nukon, metis sian klabon sub la brako kaj supreniris la monteĝon paŝon post paŝo. Li turnis sian rigardon al la suno kaj vidis ke ĝi estas malrapide subiranta. Tiam estis ĝuste la deka monato; la tagoj estis mallongaj kaj la noktoj longaj, kaj mallumiĝis tre rapide. Vu Song diris al si: "Kie estas tigro! Nur pro timo oni ne kuraĝas supreniri la monton."

Tiel Vu Song iradis iom da tempo kaj la forto de la vino ekŝvelis kaj li eksentis brulan varmegon. Li prenis sian klabon en unu mano kaj per la alia li nudigis la bruston. Stumblante kaj ŝanceliĝante li aliris ĝangalon kaj vidis grandan glatan bluan rokon. Li apogis la klabon ĉe unu flanko kaj kuŝiĝis por dormi. Subite leviĝis forta ventblovo kaj kiam ĝi pasis, li aŭdis muĝegon malantaŭ la ĝangalo kaj de tie elsaltis tigro kun elstaraj okuloj kaj blanka frunto. Ĝin vidinte Vu Song ekkriis: "Ah-jah!" li sin rulis malsupren de sur la glata blua roko, prenis sian klabon en la mano kaj rapide sin starigis apud la blua roko.

La tigro estis kaj malsata kaj soifa. Ĝi iom premis siajn antaŭpiedojn sur la teron, eksaltis supren kaj alflugis tra la aero. Vu Song estis ek-timigita kaj la vino elvenis en malvarma ŝvito. Rakonto malrapida, okazo rapida! Vidinte la tigron



alsaltanta Vu Song rapide sin movis kaj troviĝis malantaŭ la besto. Estis malfacile por la tigro vidi homon malantaŭ si kaj tial ĝi premis la antaŭpiedojn sur la tero kaj ĵet-levis la postan korpoparton por piedbati. Vu Song rapide sin ĵetis flanken kaj tion evitis. La tigro, vidinte ke ĝi ne sukcesis ataki lin per ekbato de posta piedo, ekmuĝis kvazaŭ tondrego el la ĉielo tiel, ke eĉ la monteĝo ektemis.

La tigro starigis vertikale sian voston tiel rigida kiel fera stango, kaj subite ekfrapis per ĝi. Vu Song denove sin ĵetis flanken. La tigro atakas homojn, ja nur per alsalto, piedbato kaj vostfrapo, kaj se tiuj ĉi tri rimedoj fiaskis, duono de ĝia kolera forto jam eluziĝis. Nun kiam la tigro ne trafis la homon per ekfrapo de la vosto, ĝi ree muĝegis kaj sin turnis. Vu Song, vidinte ke la tigro sin turnis, alten levis sian klabon per ambaŭ manoj, kaj per sia tuta forto li faligis ĝin malsupren tra la aero. Aŭdiĝis bruego kaj susure falis rompitaĵ branĉoj kaj folioj. Kiam li alfiksis sian rigardon, li vidis ke pro hasteco la bato ne trafis la tigron sed velkintan arbon kaj la klabo estis rompita en du partojn kaj li tenis nur ĝian duonon en la mano.

Tiam latigro eksplodis de kolero kaj muĝegadis. Ĝi sin turnis kaj denove alsaltis. Vu Song faris salton kaj malantaŭeniĝis ĉirkaŭ dek paŝojn, kaj la besto falis ĝuste tiel ke ĝiaj antaŭpiedoĵ surteriĝis antaŭ li. Tiam Vu Song ĵetis flanken la duonan klabon, ambaŭmane kaptis nodige la tigron je ĝia makula verthaŭto kaj ekpremis ĝin malsupren. La besto baraktis por sin liberigi, sed Vu Song per sia tuta forto tenis ĝin firme kaj absolute neniom lasis ĝin movi. Li piedbatadis per ambaŭ piedoj senĉese kontraŭ la vizaĝon kaj en la okulojn de la granda besto. La besto ekmuĝadis kaj elskrapinte du amasojn da argilo sub sia korpo faris kavon. Vu Song enpremis ĝian faŭkon en la kavon.

La forto de la besto elĉerpiĝis pro sia baraktado kontraŭ Vu Song. Li do firme tenis ĝian verthaŭton per la maldekstra mano, liberigis la dekstran manon, kaj tutforte batadis per la martelosimila pugno. Kiam li jam faris kvin-sepdek batojn, freŝa sango ekfluis el la okuloj, buŝo, nazo, oreloj de la tigro kaj ĝi tute ne povis moviĝi. Nur el ĝia buŝo ankoraŭ venis spasmospiro. Vu Song liberigis la manon, iris al la pinarboj, eltrovis la rompitan klabon kaj prenis ĝin en la manon. Li timis ke la tigro ne mortos, tial li denove batis ĝin per la klabduono. Nur kiam li vidis, ke eĉ ĝia spirado ĉesis, li formetis la klabon kaj pensis en si: "Mi trenu la mortintan tigron malsupren de la monteĝo. . . ."

Sed kiam li venis por levi ĝin el la sangmarĉo, neniel li tion povis! Ĉar lia forto jam elĉerpiĝis kaj liaj manoj kaj piedoj estis malfortaj.

TRAD. PANDIŜO



# INTER MONTJOJ

## VIDAĴO TRA FENESTRO DE VAGONARO

**M**ONTOJ staras apud montoj, montoj ligiĝas kun montoj, kaj inter la montoj leviĝas graciaj strioj de kuirfumo. Jen tie, estas la malgranda montvilaĝo, la dometoj dislokiĝas sur montdeklivoj kaj la fundo de valo. Mi atingis per rigardo la edzinon de arbohakisto, starantan ĉe la dompordo.

Tiom malproksime estas de ŝi, kaj la vagonaro kuras tre rapide, mi ne povas klare vidi ŝian vizaĝon, nek povas aŭdi ŝian voĉon. Ĉu ŝi vokas sian edzon ke li revenu matenmanĝi?

Montoj staras apud montoj, montoj ligas sin kun montoj. Inter la montoj troviĝas prosperaj legomparceloj, kie kukumoj dense pendas sur subteniloj, brasikoj formas per siaj folioj grandajn bulojn, la ruĝaj kvastoj de maizoj jam sekiĝis. . . . Kies legomĝardeno ĝi estas?

Juna laboristo kiu deŝiras legomojn en la ĝardeno, rektigas sin por rigardi la preterkurantan vagonaron. De tiom malproksime,

en la vagonaro galopanta, oni neniel povas informiĝi de li, ĉu li estas la viro, kiun la virino vokas. Eh, mi ne povas lin sciigi, ke lia edzino tie lin atendas. . .

Kiel multaj jaroj forpasis, dum kiuj troviĝis neniu virino inter la montoj. Iuj el la enmigrintaj laboruloj timis ofendi la montdion per virinoj, aliaj timis ke ili ne povos kutimiĝi al la klimato ĉi tie, tial ili ne volis kunpreni siajn edzinon kaj filinojn en la montaron. La pliparto el ili, pelate de la mizero alvenis ĉi tien sola por perlabori iom da mono per granda penado, kaj poste reiri hejmen kaj vivi kune kun siaj gekaruloj. Kiu el ili ja volis establi hejmon profunde en la sovaĝa montaro? Ili vivis tie solaj, luktis kun vento, neĝo kaj rabbestoj, kaj dum longa longa tempo drivis en soleco kaj malĝojo. . .

Kiel multaj jaroj forpasis, dum kiuj neniam inter la montoj kreskis legomoj kaj grenoj. La neĝo ne degelis en junio, sed ekprujnis

jam en aŭgusto, kaj plantaĵoj ofte mortis dum sia verda juneco pro frosto.

Kiel multaj jaroj forpasis, dum kiuj neniam aperis lumetoj de lampoj inter la montoj. La arbohakistoj iris al sia laboro, dum steloj briletis super la kapoj, kaj revenis al sia dormejo en lunlumo. Kiam noktiĝis, aŭdeblis nur hurloj de lupoj kaj briletis nur tigraj okuloj. . . .

Ho, sed hodiaŭ ĉi tie estas novaj vilaĝoj de arbohakistoj. Dum la tuta tago ĉe ili pulsas gaja vivo, geknaboj kuras sur la gimnastika placo de la elementa lernejo en arbaro. Oni diras, ke, ĉar la loko estas dense loĝata, ankaŭ la klimato fariĝas pli varma, kaj tial legomoj kaj cerealo ĉiujare donas riĉan rikolton. Jam enradikiĝis ĉi tie la feliĉo kaj ĝojo. Dum la tuta nokto neniam estingiĝas la lumriveroj de elektrolampoj. En la koro de la miloj kaj centmiloj eterne brilas ora lumo en ĉi tiuj valoj.

## NIAJ POŝTMARKOJ

*Specialaj poŝtmarkoj pri pando  
desegnitaj de pentristo Vu Zuoĝen  
Emisiitaj je la 5-a de aŭgusto, 1963.*



## El la Ĉina

### Klasika Poezio

#### Post Via Forveturo

Ĝang Giuling (673-740)

Post via forveturo, mia kara,  
Mi ne laboras plu sur la teksilo.  
Sopire mi similas la plenlunon:  
Malkreskas ĉiunokte ĝia brilo.

#### Ĉe la Heĝo

Vang Vej (699-759)

Hom' nevideblas en montval' silenta,  
Nur homaj voĉoj eĥas en krepusko.  
La sunrebril' penetras la densejon  
Kaj kuŝas sur la velurverda musko.

#### Pavilono en Bambuaro

Vang Vej

Mi sidas sola en la bambuaro,  
Sepkordon ludas aŭ buŝfajfas nun.  
Tiun densejon konas ja neniŭ,  
Por min prilumi venas nur la lun'.

#### Al Juan-er Kiu Veturas al Anĥi

Vang Vej

En Vejĉeng matenpluvo saturetis la stratpolvon  
Kaj ĉe l' gastejo freŝe verdaĵ flirtas la salikoj.  
Ankoraŭ unu glason malplenigu, mi vin petas:  
Trans Jangguan okcidente ne troviĝos jam amikoj!

#### Poemetoj

Vang Vej

##### I

Vi venis ja de la naskiĝvilaĝo  
Kaj devas scii pri ĝia novaĵo:  
Ĉu la prunarbo ĉe l' fenestr' ekfloris  
Jam en la tag' de via forvojaĝo?

##### II

Mi vidis jam floradon de l' prunarboj  
Kaj aŭdas jen birdkriojn en proksimo,  
Nun timas mi kun okulstreĉo, ke la  
Printempaj herboj kreskos sur pavimo.

## En Armeo ĉe la Norda Landlimo

Li Ji (?—827?)

Sur Ĉiel-mont' marvento blovas froste post la neĝo,  
Flut' ie ludas pri "Malfacileco de l' Vojaĝo",  
Da militistoj tricent miloj en dezerto sabla  
Ekturnas ĉiu sian kapon en la lunpejzaĝo.

#### Pri Terlaboristoj

Li Ŝen (8-9a jarcento)

##### I

Printempe oni semas unu grajnon,  
Dekmil rikoltas en aŭtun' de l' ŝpato,  
Nenie estas col' da tero virga,  
Kampuloj tamen mortas de malsato!

##### II

Ŝvito faladas teren, kiam oni  
Sub brula suno sarke flegas grenon.  
Kiu ja scias, ke en lia bovlo  
Ĉiu grajneto kostas grandan penon!

#### Maljuna Kamparano

Ĝang Gi (768?-830?)

Povra maljuna kamparano sur dezerta monto  
Kulturus terpeceton. Aĉe vivas li malsata  
Pro la rikolt' mizera kaj imposto peza. Devas  
La greno rubamase putri en tenejo ŝtata.

Kiam la ŝpatoj kuŝas vintre en la dom' malplena,  
Glanon kolektas li kun sia filo piedvage,  
Dum en la ŝip' de riĉa komercisto vojaĝanta  
Hundeton oni nutras per viando ĉiutage.

#### Printempa Malgajo

Gin Ĝanghju (ĉirkaŭ 9a jarcento)

Forpelu jam la oriolon,  
Ke ĝi ne trilu sur la branĉo!  
De l' tril' vekigiĝos mi el sonĝo  
Kaj ne ĝisvenos ĉe l' fianĉo.

#### Ĉe la Fronto

Hju Hun (9a jarcento)

Nokta batalo sur Sanggan-rivero:  
Multaj soldatoj iris senrevene.  
Alvenas vintraj vestoj kun letero  
Ankoraŭ el la hejmo ĉi-matene!

Trad. S. J. Zee



# Literaturo kaj Ŝvito

**L** EKCIANTE pri literaturo, iu profesoro\* en Ŝanhajo diris ke literaturaĵo devas priskribi la neniam ŝanĝigantan homecon, alie ĝi vivdaŭros ne longe. Ekzemple, en Anglio Ŝekspiro (Shakespeare) kaj unu-du aliaj skribis pri la eterne sensanĝa homeco, tial iliaj verkoj disvastiĝas ĝis nun; la ceteraj ne, kaj ĉiuj iliaj verkoj malaperis.

Tio estas vere io, kiel oni diras: “Kiam vi ne klarigis, mi ankoraŭ povis iom ĝin kompreni, sed ju pli vi klarigas, des pli mi konfuziĝas.” Ke formalaperis iuj anglaj verkoj el pasinteco, tio estas ebla, laŭ mia opinio. Sed mi neniam imagis ke ili malaperis pro tio ke ili skribis ne pri eterne sensanĝa homeco. Nun, informiĝinte pri la kialo, mi tamen ne povas kompreni plie, kiel nia nuntempa profesoro povas vidi la jam malaperintajn verkojn, kaj eĉ konkludas ke ilia enhavo senescepte ne temis pri la eterne sensanĝa homeco.

Nur kiu disvastiĝas, estas bona verko kaj kiu ne disvastiĝas, estas malbona; nur kiu rabakiris la landon estas reĝo, kaj kiu ne sukcesis rabakiri la landon, estas rabisto. Ĉu la koncepto de ĉinoj pri la historio ankaŭ ekvalidas por ili en tiu pri la literaturo?

Kaj ĉu ne ŝanĝiĝas por eterne la homeco?

Homsimila simio, simiosimila homo, prahomo, antikvulo, nuntempulo, estonta homo . . . se la estaĵoj vere evoluas, do ne povas ne ŝanĝi la homeco. Por ne paroli pri la simiosimila homo, eĉ la humoron de prahomo verŝajne ni ne povas konjekti. Estas same ke ankaŭ nian humoron probable ne komprenos la eston-

taj homoj. Do estas vere malfacilege priskribi la eterne sensanĝan homecon.

Ekzemple, la ŝvitado, laŭ mia opinio, verŝajne ekzistis ja en la estinteco, same ekzistas en la nuneco kaj ekzistos ankaŭ en la estonteco almenaŭ provizore, eble ĝi estas kalkuleba kiel relative “eterne sensanĝa homeco”. Sed la ŝvito de fraŭlino “simila al petalo en vento” estas aroma, dum tiu de la “bove stulta” laboristo — haladza. Pri kiu skribu la verkisto, kiu volas krei senmortan verkon kaj fari sin senmorta literaturisto, ĉu pri la aroma ŝvito aŭ la haladza? Sen antaŭa solvo de tiu problemo lia pozicio en la literatura historio estas efektive malsekura.

Oni diras ke antaŭe la noveloj, ekzemple en Anglio, estis skribata ĉefe por sinjorinoj kaj fraŭlinoj, do kompreneble, ili temas pli multe pri la aroma ŝvito. Poste, je la lasta duono de la 19-a jarcento, influate de la rusa literaturo, en la noveloj jam ne mankas haladza ŝvito. Kiu havos pli longan vivon, nun oni ankoraŭ ne povas scii.

En Ĉinio, tiel la predikado de taoisto pri taoismo kiel la lekciado de kritikisto pri literaturo, ĉiam konvulsiĝas la porojn kaj malhelpas la ŝvitadon. Tamen, eble ĝuste tio estas la eterne sensanĝa homeco de ĉinoj?


Verkita la 23-an de dec. 1927.

Trad. Guozhu

\*Aludas pri Liang Ŝikiu, kiu pledis por la reakcia burĝa teorio de homeco.

(Daŭrigo de p. 248)

kaj poste la tutan nigran grupon; kaj en la diagramo 16 la blanka




Diagramo 16

flanko distranĉis la nigran flankon en du grupojn per la ŝtonoj A

kaj B, kaj forkaptos la du grupojn unu post la alia.

**Loko por okuloj** — En praktiko de vejĉi-ludo, oni tamen neniam unue sin okupas pri formado de okuloj, kvankam tio estas vitala kondiĉo por sekurigi la grupojn de sia flanko. Ĉar tiam oni perdos ŝancon okupi pli grandan teritorion, kio decidas la venkon kaj malvenkon. Tial por atingi samtempe la du celojn sekurigi sian grupon kaj okupi pli grandan teritorion, oni ne urĝas krei okulojn, se en sia teritorio troviĝas sufiĉa loko por okuloj. Ekz-e en diagramo 17, la nigra grupo kvankam ankoraŭ ne havas okulojn, sed ĝi estas sekura, ĉar ĝi



Diagramo 17

havas lokon por okuloj. Se la blanka flanko ne plu ĝin atakos, ĝi povos forlasi ĉi tiun grupon kaj meti ŝtonon aliloke por okupi novan teritorion, kaj se la blanka ĝin atakos je punkto Ĉ, tiam la nigra respondos je C; la blanka daŭros je A, la nigra je B (aŭ la blanka je B, la nigra je A). Tiam du veraj okuloj estos formitaj.

## El Ĉinaj Fabloj

### La Karaso en Senakva Vojsulko

La filozofo Ĝuangzi vivis tre malriĉe. Foje li petis de Gianhehoŭ pruntedonon de greno, sed tiu ĉi diris:

“Bone! Sed, atendu ĝis kiam mi ricevos la lu-pagon, kaj tiam mi pruntos al vi tricent uncojn da arĝento, ĉu bone?”



Ĝuangzi multe indignis kaj faris la jenan alegorion:

“Hieraŭ, dum mia promenado, mi vidis karason kuŝanta en vojsulko senakva. Vidante min la karaso kriis:

“Avĉjo, mi venis el la Orienta Maro. Malfeliĉe hodiaŭ mi falis en la vojsulkon. Mi baldaŭ mortos pro sekeco. Bonvolu doni al mi sitelon da akvo por savi mian vivon!”

“Mi kapjesis dirante:

“‘Bone, ĝuste nun mi volas viziti kelkajn regnestrojn en la sudo, kie akvo ja abundas. Mi certe alkondukos la akvon de la Okcidenta Rivero por vin savi!’

“La karaso indigniĝis:

“‘Kion tio povas helpi? Nun donu al mi nur unu sitelon da akvo kaj jam saviĝos mia vivo. Se mi atendus la akvon el la Okcidenta Rivero, mi timas ke vi trovos min ne ĉi tie, sed en vendejo de peklitaj fiŝoj.’”

(El “Ĝuangzi”)

### En Malĝusta Direkto

Antaŭe, iu homo volis veturi de la Centra Ebenajo (nun la baseno de la Flava Rivero) al la regno Ĉu (nun la baseno de Jangzi-rivero). Evidente Ĉu-regno estis en la sudo de la Centra Ebenajo sed li veturis norden.

Sur la vojo oni diris al li:

“Samlokano, vi eraras. Se vi volas veturi al Ĉu-regno, vi devas iri suden. Kial vi veturas norden?”

Li respondis: “Ne gravas, mi havas bonan ĉevalon, kiu kuras tre rapide!”

“Kiel ajn bona via ĉevalo estas kaj kiel ajn rapide ĝi kuras, se vi veturas en tiu direkto, vi neniam atingos Ĉu-regnon!”

“Estas ne grave. Mi havas multan vojaĝmonon.”

“Kiel ajn multan vojaĝmonon vi havas, ĝi ne sufiĉas. Se vi veturas en tiu ĉi direkto, vi certe ne atingos Ĉu-regnon!”

“Ne grave. Mia koĉero estas tre lerta konduki la ĉevalon.”

KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \*

### METODO POR KULTURI DEZERTON TROVITA

En Ninghia-a Huj-a Aŭtonoma Regiono de la nordokcidento de Ĉinio, troviĝas ĉirkaŭ 1,000,000 hektaroj da arbusta dezerto, kie neniam ekzistis agrikulturo pro nekulturebleco de la grundo. Sed depost 1959 pli ol 6,600 hektaroj estas kulturataj de dek ŝtataj farmoj de bestbredado kaj arbar-kulturo, rezulte de esplorado de sciencistoj. Por plibonigi la grundon estas aplikitaj diversaj metodoj ekz-e irigacio, drenado kaj kulturo de verdaj sterkaj kreskaĵoj ktp.

Pli ol 30 grenaj kaj industriaĵoj kreskaĵoj inkluzive kotonon, triti-

kon kaj arakidon estas eksperimente kulturataj en la areo.

### RIĈA RIKOLTO EN SUD-ĈINIO

La popolaj komunumoj de Guangdong-provinco havis riĉan rikolton de frumatura rizo. Malgraŭ ke longa sekeco de ok monatoj okazis tie, la meza produkta kvanto po-hektara de la frumatura rizo 40% superas tiun de 1962, kiu estis konsiderata la jaro plej riĉrikolta en tiu loko.

### PLI DA LIBROJ AĈETIS LA KAMPARANOJ

Laŭ statistiko en la unua duono de la kuranta jaro la kamparanoj de Siĉuan-provinco, unu el la

ĉefaj rizproduktaj regionoj, aĉetis pli ol 52,000,000 librojn, t. e. 63% pli multe ol en la sama periodo de 1962. Tio estas rezulto de la kresko de la postlaboraj kursoj por analfabetoj kaj la regulaj elementaj kaj mezaj lernejoj. La aĉetitaj libroj ampleksas de abclibroj de agronomio ĝis romanoj kaj verkoj de k-do Maŭ Zedong.

### SOMERA MUZIKA FESTO

En la mezo de lasta julio okazis la tria jara somera muzikofesto de Harbino de la nordoriento de Ĉinio. En la unua koncerto de la unua vespero partoprenis mil profesiaj kantistoj, muzikistoj kaj amatoroj.



La homo, kiu volis veturi al Ĉu-regno, ne konis sian eraron kaj veturadis laŭ la malĝusta direkto. Nj estas certaj ke ju pli bona estis lia ĉevalo, ju pli multe da vojaĝmono li havis, ju pli lerta estis lia koĉero, des pli malproksimen de Ĉu-regno li veturis.

(El "Kroniko de Militantaj Regnoĵ")



## La Memkontenta Koĉero

Kiam Janzi oficis kiel ĉefministro de la regno Ki, iutage li veturis per kaleŝo, kaj preterpasis la domon de la koĉero. La koĉeredzino vidis tra pordfendo, ke ŝia edzo fiere sidas sur la kaleŝo sub granda ombrelo kaj svingadas la vipon memkontente.

Tuj kiam la koĉero revenis hejmen, lia edzino lin alparolis por eksedziniĝo. Kiel tondro en la blua ĉielo, li tute ne komprenis kio okazis, kaj ŝin demandis: "Pro kio vi volas eksedziniĝi de mi?"


Ŝi diris: "Janzi estas ĉefministro de la regno Ki, kaj ĝuas renomon en ĉiuj landoj. Hodiaŭ mi vidis lin sidanta en la kaleŝo kun kapo klinita. Li estas tiel modesta. Sed vi, lia koĉero, pozas tiel fieracha. Tial mi ne plu volas vivi kun vi."

Depost tiam la koĉero ŝanĝis sian sintenon kaj fariĝis tre modesta.

Vidinte ke la koĉero sin tenas tute malsame ol antaŭe, Janzi demandis al li la kialon kun miro. Responde li diris al Janzi ĉion, kio okazis.

Janzi opiniis ke la rapida korekto de lia sinteno estas tre bona, kaj poste rekomendis lin por altranga ofico.

(El "Janzi Ĉunkiŭ")



KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \*

La programo de la festo ĉefe konsistis el revoluciaj kantoj kaj novaj verkoj pri nuntempaj temoj de la harbinaj komponistoj. La tuta festo prezentis pli ol kvindek kantojn kaj instrumentajn muzikojn verkitajn de harbinaj muzikistoj en lasta jaro. Sume ducent kvardek tri programeroj estis prezentitaj dum la festo.

### LA UNUA FILMO PRI TIBETA VIVO

Nun en Lhasa estas produktata de tibetaj aktoroj la unua filmo kun tibetlingva interparolo pri la vivo de tibetanoj. La titolo de tiu filmo estas *Servutulo*. Tra tipa historio de Ĝamba, servutulo dum

la duono de lia vivo, la filmo malkaŝas la brutan regadon de servutula sistemo en Tibeto, kaj reflektas la batalojn de la tibetaj servutuloj por emancipiĝo.

### PLI DA AGRIKULTURAJ MAŝINOJ

Pli da agrikulturaj maŝinoj estas produktitaj en la unua duono de 1963 ol en la sama periodo de 1962. Ekzemple la produktokvanto de ekipaĵoj por fabrikoj de nitrogena sterko, en tiu periodo superis tiun de la tuta jaro de 1962. Je 30% pliiĝis la produktokvanto de traktoroj. Ankaŭ la produktokvanto de pumpiloj por irigacio kaj drenado duobliĝis.

Ankaŭ la produkto de ĉiuj aliaj maŝinoj por la kamparo, ekzemple maŝinaroj por elektro-transigo, maŝinoj kaj motoroj por irigacio, kaj torniloj por kamparaj maŝinriparaj stacioj, estas pliiĝita.

### LA UNUA ŜAK-LERNEJO POR GEKNABOJ

Je la komenco de tiu ĉi jaro estis fondita en Kantono la Unua Ŝak-lernejo por Geknaboj. En ĝi nun troviĝas 47 gelernantoj 7- ĝis 14-jaraj. Dek kvin el ili estas knabinoj.

La instruata ŝakarto estas Vejĉio, tradicia en Ĉinio jam de antikvo, foje konata ankaŭ per ĝia japana nomo "go".

# La Blankjad-floro

ĈINIO havas multe da famaj belaj floroj. Estas lokoj kies nomoj ligiĝas kun tiaj floroj, nome, la peonioj de Luoĵang, umeofloroj de Guŝan k.c. Sed neniam troviĝis ia floro, kia blankjad-floro de Jangĝoŭ, tiom alloga kaj tiom intime ligita kun ĝia produkto. Ĉar aliaj floroj ĝenerale kreskas en diversaj lokoj, sed blankjad-floro estas floro malofta kaj kreskas nur en Jangĝoŭ, la urbo vizitinda pro ĝia pejzaĝo ĉe la norda bordo de malsupra Jangzi-rivero.

La blankjad-floro karakterizigas per tio, ke ĝi estas altkreska kun floroj neĝeblankaj, densaj kaj aromaj. Meze de ĉiu floro estas multaj floretoj en formo de kunligitaj belbrilaj perloj, kiujn ĉirkaŭas orname 8 aŭ 9 grandaj

stamenaj floroj kun po 5 petaloj kvazaŭ ripozantaj papilioj en koloro de blanka jado.


Rara tamen tre vaste konata estas tiu floro pro la legendoj pri ĝi inter la popolamasoj.

Oni diras ke en la komenco de la 7-a jarcento, la imperiestro — Suj Jang, por ĝui la blankjad-florojn en Jangĝoŭ, laborigis multegon da popolanoj por konstrui kanalon pli ol mil kilometrojn longan de Luoĵang ĝis tiu urbo Jangĝoŭ. Sed la floro estas dia mirindaĵo kiun tia despoto kia li ne havas la feliĉon vidi. Kiam la


kanalo estis preta kaj la imperiestro atingis Jangĝoŭ en sia drakoŝipo, la blankjad-floroj jam estis neniigitaj de subita atako de vento, pluvo kaj hajlo en la antaŭvespero. La reĝimo de tiu tirano estis renversita tiujare de la kamparana ribelo diversloka kaj li mortis en Jangĝoŭ.

Oni ne trovis sufiĉajn dokumentojn por pruvi la kredindecon de tiu ĉi antikva legendo, tamen hortikulturistoj asertas post esplorado, ke la kulturado de tiu floro efektive komenciĝis jam en la 10-a jarcento. Tiam famaj literaturistoj, kiaj Oŭjang Hiu k.a. verkis poemojn pri ĝi.

Sed la nuntempa blankjad-floro jam ne estas la sama, ĉar la antaŭa arbo de tiu floro jam forvelkis en 1276 p.K. La nunaj du arboj pli maljunaj estas poste plantitaj kaj ankaŭ iliaj floroj iom diferencas de la antikvaj (*vidu la bildon apude*). Lastatempe hortikulturisto konstatis post unuapaŝa ekspertizo ke ĝi estas plantajo de la samaj genro kaj familio de blankjad-floro, kaj la patro aŭ praavo de la pereinta arbo. Ĝia scienca nomo estas *Viburnum Macrocephalum Fort F. Kateleeri (Carr) Rahd.* Tute similaj estas iliaj floroj, tial ĝi ankoraŭ heredas la belan nomon de blankjad-floro, rolante kiel unu el la vidindaĵoj de la pitoreska urbo Jangĝoŭ. Kaj ĝi senĉese allogas vizitantojn diverslokan dum sia florado en la komenco de somero ĉiujare.



Ŝtongravurita blankjad-floro en 1845 p.K.





## La Man-tira Florajo

La mantira florajo el papero estas speciala metiartajo de Ĉinio. Estas du specoj de ĝi: ludiloj (diversaj aliformeblaj floraĵoj, paperaj ventoradoj k.t.p.) kaj ornamaĵoj, kiujn oni uzas por dekoraciĝi ceremoniejojn, la ĉambrojn de novaj geedzoj, arkajojn de soleno ktp.

Mantiraj floraĵoj estas ŝatataj en nia lando ne nur de geknaboj, sed ankaŭ de plenaĝuloj. Ili estas malmultkostaj kaj tre variaj en formoj kaj koloroj. Prenu tirfloraĵon en la manoj, tiru ilin ambaŭflanken, turnu unu ĉirkaŭ la alian aŭ tenu la teniletojn, movu ilin laŭ aliaj eblaj direktoj kaj vi vidos objektojn malsamajn en formoj kaj koloroj.

Por fari mantirajn floraĵojn oni bezonas nur pecojn da blanka papero, du tri bambuajn bastone-tojn kaj iom da koloriloj de ruĝo, verdo kaj flavo. Tondu la paperon en pecojn, ilin faldu kaj kungluu tiel ke ili fariĝu abeluj-simila ajuraĵo. Tondu la ajuraĵon en difinitan formon, ĝin kolorigu, algluigu al ĝi du bambuajn teniletojn kaj vi pretigos specon da tia floraĵo. Se oni formas mantiran floraĵon ne el tia abelujsimila paperajuraĵo, sed nur el multfaldaj paperslipetoj, ĝi eĉ povas ricevi variajn formojn je ekskuo aŭ tiro aldirekta. Kiam oni fermas ĝin, ĝi fariĝas plateto, facile kunportebla en poŝo. Tiaj ludiloj estas unu el la plej multe venditaj dum la festotagoj.

Tie ĉi estas bildoj de kelkaj mantiraj floraĵoj faritaj de la fama artisto Kian Hongcaj. Ĉu ili ne estas simplaj kaj interesaj?

*Duone malfermitaj florkorbo (en la manoj de la pliaĝa knabineto) kaj kiosko.*



*En laborejo de metiartistoj de man-tiraj paperfloraĵoj.*

*Kiel bela blanka pagodo!*



# De Sukerpeco al Skriba Lingvo

**J**EN tri etaj paperpakajoj — tri leteroj de kavaoj\*.

En la unua estas kuba sukerpeco, sur kiu troviĝas ses malgrandaj kaj unu pli granda kavaoj; en la dua, estas same granda salpeco kun unu tratrao; kaj en la tria, du kokplumoj kaj dudek unu pecetoj de lignokarbo.

Sen klarigo, mi kredas, neniu povas diveni ilian signifon.

La incidento okazis en printempo, 1945. Iu kavao el Janŝuaj estis murdita sur strato en Mengjun. La janŝuajanoj informiĝis pri tio kaj postulis ke la mengjunanoj liveru la krimulon kaj krome ses mil juanojn kiel kompensajon; alie, ili forbruligos kaj ekstermos sange la tutan Mengjun. La tri paperaj pakajetoj estis la ultimato sendita al Mengjun.

La unua pakajeto signifas, ke ambaŭ flankoj ankoraŭ povos vivi en paco kaj amikeco kiel sukero, sed per ses kavetoj oni postulas ses mil juanojn kaj per la pli granda kaveto liveron de la krimulo. La salo en la dua pakajeto montras, ke ili jam ne havas amikan senton la unuj al la aliaj; la tratrao esprimas, ke ne estas eblo pri kompromiso: donu nepre la kompenson kaj la krimulon. En la tria, la du plumoj kaj dudek unu pecetoj de lignokarbo diras, ke oni bruligos la domojn kaj buĉos la loĝantojn de Mengjun je la dudek unua tago de la dua monato.

En la pasinteco, la kavaoj ne havis sian propran skriban lingvon. Ili kutimis esprimi sian penson per objektoj. Ekzemple, oni simboligas amikecon per pizango aŭ sukero, kaj militon per kuglo aŭ kapsiko. Sed tio finfine ja estas maloportuna esprimrimedo.

Poste, misiistoj el imperiismaj landoj kreis serion da signoj por skribi la kavaan lingvon kaj ilin uzis inter la kavaaj religianoj. Sed la signaro ne estis sufiĉa kaj taŭga, ĉar tiuj misiistoj havis sian mision kiel vojpretigantoj de imperiismo, sed ne la celon fari sciencajn laborojn pri lingvo. Per tiuj signoj oni ne povis distingi "tagmanĝon" dis de "vinotrinko", nek "vendon de bovo" dis de "vendo de pizango". Kaj por lerni tiun netaŭgan skribon oni devis pagi centojn da kg. da greno aŭ dekojn da juanoj!

Post la Liberiĝo la kavaoj jam ekhavis sian propran skriban lingvon. En marto 1957, en la lingvistika konferenco de la nacimultiplimultoj en Junnan-provinco estis akceptita la unua projekto de la kavaa skriba lingvo, kiu estis ellaborita sur la bazo de riĉa materialo de vasta esploro kaj enketo. La projekto de la kavaa skriba lingvo prenis la bujaŭ-dialekton kiel sian fundamenton kaj janŝuajan sonsistemon kiel la normon de prononcado. Ĝi adoptis la plej vaste uzatajn latinajn literojn kiel sian

alfabeton. Ĝi povas science esprimi la karakteron de la kavaa lingvo kaj estas facile lernebla kaj uzebla por la kavaoj, tial en periodo de la prova uzado oni jam ĝin varme bonvenigis. Antaŭ kelkaj jaroj revizioj estis faritaj al la projekto laŭ la opinioj de popolamasoj kaj la principo laŭeble proksimiĝi al la fonetika alfabeto (projekto) de la hanlingvo. En la lastaj jaroj ĝi jam iom post iom pli perfektigis dum la praktikado.

Nun, en ĝi estas eldonitaj lernolibroj de elementaj lernejoj kaj kelkdek legajoj, kaj centoj da instruistoj estas eledukitaj. Miloj kaj dekmiloj da kavaoj jam ellernis ĝin kaj ĉesis esti analfabetoj.

\* *Kava-nacio estas unu el la nacimultiplimultoj en Ĉinio. Laŭ la statistiko de 1958, la nombro de kavaoj atingis pli ol ducent mil. Ili plejparte loĝas en Junnan-provinco, kaj okupas sin ĉefe pri agrokulturado. Antaŭ la Liberiĝo, la plejparto de ili trovis sin ankoraŭ en la etapo transira de la primitiva komunumo al la klasa socio.*

## NOVELOJ DE LUSIN

*Preskaŭ kompleta novelo-kolekto de la majstro de moderna ĉina literaturo. 13 × 21 cm., 534 paĝoj, riĉe ilustrita.*

Prezo: 25 steloj, £0-12-9, Rb. 1.61

*Mendu ĉe niaj perantoj aŭ Libro-Servo de ĈEL.*



## Globuso

Nuntempa rusa popola kanto, kreita en 1947 j. La unuaj du strofoj apartenas al sovetia dramverkistro M. Lvovskij; la du lastaj, al la tradukinto.

Kie ni renkontiĝos,  
mi ne scias ĝis nun;  
kaj globuso\* turniĝas  
en radioj de l' sun'.  
Preterpasas urboj, oceanoj,  
paraleloj kaj meridianoj;  
ne desegnis oni nur punktaĵojn,  
kiuj montras niajn mondvojaĝojn.

Estas iu terpeco,  
scias mi, bela lok',  
kie de amikeco  
nin kunigos alvok'.  
Ni rakontos pri aferoj gravaj,  
kiaj estis tiam ĉiuj bravaj,  
kaj de nia laborado lerta  
mapon precizigi helpis sperto.

Ni memoros eterne  
lumon de brullignar',  
noktoj en montkavernoj  
kaj grimpadon trans bar'.  
Tremis ni ĉe trunkoj ĉe abiaj,  
iam kantis pri gutetoj iaj,  
pri gutetoj tiom soifitaj,  
pri kusenoj varmallogaj litaj.

Kaj dum ekspedicio  
sonas tiu ĉi himn';  
nia, laŭ tradicio,  
opinias ni ĝin;  
ĉar ni estas la popol-vaganto,  
ĉar ne povas vivi ni sen kanto;  
ni konservas tiun bonan moron,  
por ke ŝimo ne penetru koron.

Aŭdos unu alian  
trans altaĵ' de montar',  
supersonos voĉ' nia  
venton de februar'.

Kaj tra distanceg' milkilometra  
flugu amikeca kant' penetra;  
kiam do finfaros ni laborojn,  
tiu kant' varmigu niajn korojn.

Kie ni renkontiĝos,  
mi ne scias ĝis nun.

Jen somero finiĝos,  
komenciĝos aŭtun'.  
Reveninte ni pri kunmigradoj  
tuj rakontos al gekamaradoj;  
pri la lokoj ĵuse vizititaj,  
pri l' amikoj tie renkontitaj.

Kiel ajn estas foraj  
ni en vasta patruj',  
rapidiĝon de l' koraj  
batoj sentas ni tuj,  
se al ni eksonos kiel kanto  
nia bela lingvo Esperanto;  
ĉar al celo unu ni aspiras,  
ĉar al ĝi ni ĉiuj kune iras.

Sed vekiĝas la tero,  
ĝin verdigas la sun';  
en tendar' dum somero  
kolektiĝis ni nun.  
En tendaro kiel bela kanto  
sonas nia lingvo Esperanto;  
kaj ni kantas kun amikoj niaj,  
kiuj estas nun en hejmoj siaj.

## Ne Revu ... ..

Ne revu pri fina ripozo,  
ĉar estas ĝi simple la morto.  
Nur antaŭ potenc', grandiozo,  
humile sin klinas la sorto.

Ne revu pri conĝaj allogoj,  
ĉar estas ja ili nur trompo;  
de bel' efemera mensogo,  
de falsa floraro la pompo.

Sed nur al senĉesa batalo  
preparu vin, ĉiam atenta;  
kaj siajn misterojn realo  
malkovros nur tiam silenta.

Kaj flustros naturo konfida  
pri belo de l' vivo alterna,  
Kaj vento rakontos tepida  
fabelojn de l' saĝo eterna.

Kaj tra universa senrando  
vi flugos, serĉanto senĉesa,  
kaj regos en stela forlando  
per via rigardo karesa.

Sed se vi al sorto kun fido  
ekdormos trankvile kaj pace,  
turniĝos en ŝtormon tepido,  
kaj mort' ekrikanos minace.

\*Globuso—kartona geografia terĝlobo. En la lasta strofo temas pri Ĉebaltaj Esperantotendaroj en USSR.


# VEJĈIO

## HONFAN

### 5. Necesa Kondiĉo por Sekurigi la Ŝtonojn

**Liberaĵ punktoj**—Kiel oni vidas, ke nur liberaĵ punktoj de la okupita teritorio garantias la sekurecon de la metitaj ŝtonoj. Tial krei tiajn punktojn por sia propra flanko estas kerna arto por vejĉiludo.


Ĝenerale oni povas meti sian ŝtonon sur ĉiun punkton. Sekve libera punkto povas esti okupita de la kontraŭa flanko. Kiu flanko perdas unue sian lastan liberan punkton, la ŝtonoj de tiu flanko estas forkaptitaj. Ekz-e en la diagramo 10, por la blanka flanko estas multaj liberaĵ punktoj, sed



Diagramo 10

por la nigra restas nur unu, t. e. la A-punkto, kaj ĉi tiun punkton la blanka flanko povas libere okupi por forkapti la nigran grupon, sed la nigra jam ne povas meti ŝtonon sur ĉi tiun punkton, ĉar tiam ĝi forigos de si mem la lastan liberan punkton.


**Okuloj**—Do por sekurigi la metitajn ŝtonojn estas necese, krei liberaĵ punktojn, kiujn la kontraŭa flanko ne povas okupi. Tiajn punktojn oni nomas **okuloj**. Ekz-e en diagramo 11, A estas okulo por



Diagramo 11


la nigra flanko, kie estas malpermesate por la blanka flanko meti ŝtonon. Ĉar tiam por la metita blanka ŝtono troviĝas jam neniu libera punkto, kaj ĝi devas esti tuj forkaptita de la nigra flanko.

Tial tiuj kvar nigraj ŝtonoj estas sekurigitaj provizore. Sed kiam la kontraŭa flanko okupis la ĉirkaŭajn liberaĵ punktojn, ĝi povas okupi la A-punkton kaj kapti la nigran unu post alia, kiam ili estas ne interligitaj ĉe la punktoj B, C, Ĉ, D (diagramo 12);



Diagramo 12

kaj kolektive, kiam ili estas interligitaj (diagramo 13).



Diagramo 13

Okulon formitan per neinterligitaj ŝtonoj oni nomas **falsa okulo**, kaj tiun per interligitaj ŝtonoj, **vera okulo**.


El la superaj paragrafoj venas jenaj plej gravaj reguloj de vejĉio: Nombro da interligitaj ŝtonoj formas unu grupon kaj de ĉi tiu

grupo la kontraŭa flanko ne povas forŝiri kaj forkapti iun ajn ŝtonon aparte.

Por sekurigi iun grupon almenaŭ du veraj okuloj estas nepre necesaj.

Por bone kompreni la regulojn, ni vidu la diagramojn 14, 15 kaj 16.


En diagramo 14, la nigra grupo



Diagramo 14

havas du verajn okulojn ĉe A kaj B. Tial kvankam ĉirkaŭata ĉiuflanke ĝi restas sekura. Ĉar sur nenium el la du punktoj la kontraŭa flanko povas meti sian ŝtonon.

Male en la diagramoj 15 kaj 16.



Diagramo 15

Ĉar en diagramo 15 la blanka flanko povas meti ŝtonon sur punkton A, kiu estas falsa okulo, por forkapti unu nigran ŝtonon, (Daŭrigo sur P. 241)



# Pri Problemo de Universala Lingvo en la I-a Internacia Societo de Laboristoj

Sur paĝo 151 de n-ro 3 de nia gazeto ĉijare ni aperigis informon el Moskvo pri raporto de tiu ĉi temo. Lasttempe ni ricevis korektan leteron de la raportinto. Ni volonte aperigas la korekton ĉi tie, ke la interesatoj ricevu pli precizajn materialojn pri tiu ĉi problemo.

— LA RED.

1) La Geneva kongreso temis pri "universala lingvo", ne pri "internacia". Koncepto pri internacia lingvo aperis poste, trans 20 jaroj pro intuicio de d-ro Zamenhof.

Ideo pri *universala* lingvo en 1866 kaj 1867 jaroj estis pli disvastigita dank' al la verkoj de utopianoj de la komenco de XIX jarcento.

2) Problemo pri universala lingvo estis traktata dum la unua kaj la dua kongresoj de Internacio — tio rilatas al la Geneva kongreso en 1866 jaro (ne 1860!!) kaj la Lausanna kongreso en 1867 jaro.

3) La Geneva kongreso *ne* esprimis deziron ke por internacia lingvo estu akceptita simpligita franca. Estas vere, ke la kongreso diskutis pri simpligo de la franca lingvo, tamen la rezolucio, akceptita de la kongreso estis jena:

"La Kongreso esprimas sian simpation al societoj kaj al apartaj personoj kiuj laboras pri simpligo de la franca ortografio, por faciligi lernadon de legado kaj skribado al tiuj, kiuj ne posedas por tiu lernado sufiĉan tempon. La Kongreso ankaŭ esprimas sian favoron al tiuj, kiuj penas krei

universalan lingvon, por plifortigi interrilatojn de homoj de diversaj nacioj kaj fari ilin plej fruktonaj por feliĉo de homo."

Do vi vidas, ke la tezo pri simpligo de la franca ortografio kaj la tezo pri universala lingvo estis sendependaj.

4) La dua (Lausanna en 1867 jaro) kongreso ankaŭ sin okupis pri universala lingvo. La dua kongreso akceptis jenan rezolucion:

"La Kongreso estas konvinkita, ke universala lingvo kaj reformo de ortografio estus ĝenerala bonfaro kaj forte kontribuos unuecon de popoloj kaj fratecon de nacioj."

5) Do ankaŭ dum la dua kongreso ambaŭ tezoj — simpligo de la franca ortografio, kaj la universala lingvo, estis paralelaj, sed ne interdependaj.

6) Eĉ dum debatoj simpligo de ne nur franca lingvo ne estis eventuale tuŝita kompare kun universala lingvo.

Tiaj estas faktoj, fuŝe prezentitaj al internacia publiko en n-ro 3 de 1963 de EPĈ.

7) Ĉiuj informoj pri kongresoj estas preneblaj el eldono:

"*Le I-er Internationale*".

"*Recueil de documents publiés sous la direction de Jacques Freymond.*"

Tome I. Genève, 1962.

Presse universitaire.

Tiu eldono entenas precizajn represojn de aŭtentikaj unuaj presaj raportoj de ambaŭ kongresoj.

Post ol la raporto estis farita estis trovitaj en fakoj "Rimarkoj" kaj "Datoj pri Eventoj de Vivo de Marks", presitaj en XVI Volumo de Plena Verkaro de Marks kaj Engels jenaj aldonaj informoj:

1) En 1-an Internacion eniris diversaj grupoj de socialistoj inter aliaj — la prudonanoj, plejparte el Parizaj laboristaj rondoj — unu el ili — Giljom, kiu ĝuste kaj insiste defendis rezolucion pri universala lingvo.

2) Prudon kaj liaj disĉiploj opiniis, ke nacia problemo estas tute malgrava kompare kun socia — do ili ignoris nacian problemon kaj ĝiajn malfacilaĵojn.

(En artikolo pri Prudon Marks riproĉas Prudon pri lia nekompetenteco en verko pri universala lingvo. Rigardu Volumojn 3 kaj 4 pri Prudon.)

3) Marks, kontraŭe, donis al tiu problemo gravan signifon.

4) Post la 3-a kongreso en Gaaga Marks eldonis kune rezoluciojn de 1-a kaj 3-a kongresoj, preterlasinte la 2-an. Do li malkonfesis la 2-an kongreson.

Sekve: 1) Marksanonj ne rajtas tro fanfaroni pri menciitaj rezolucioj.

2) Estas necese pli profunde esplori veran rilaton de Marks al universala lingvo.

Sendu al ni materialon: belajn bk, diversajn pm, insignojn, prospektojn, popoleltranĉaĵojn k aliajn esp-ajojn. Rekompence vi ricevos bk k prospektojn el Pollando. Oni ankaŭ dez. kor. Skribu al: Polski Związek Esperantystow, Oddzial Gdynia, ul. Migaly 43/17, Pollando.

\*Franca fervojisto dez. kor. k interŝ. pm. kun aziaj s-anoj, certa respondo. Sro. Delaquaize, 52, rue Gandillet, Carrieres-sur-Seine, Francio.

(Daŭrigo de p. 258)

\*Zaĥarov Georgij Ŝtepanoviĉ (28-jara teknikisto-konstruisto), 10-u gorodok, ĉ3a, Tbilisi-13, Kartvelio, USSR, volas kor. kun ĉ.l. k interŝ. bk, pm, insignojn, E-gazetojn k jurnalajn, k.a.

\*Josef Pacalt, Hajnice, okr. Irutnov, Ĉeĥoslovakio, dez. kor. pri kulturado de legomoj kaj floroj.

\*Filio de Pola Esp.-Asocio en Gdynia aranĝas grandan ekspozicion pri Esp-movado en la mondo.

# LIBROJ PRI LA INERNACIA KOMUNISMA MOVADO

Cefartikoloj el "Renmin Ribao" kaj "Ruĝa Flago"

(en diversaj lingvoj)

**Proletoj de Ĉiuj Landoj Unuiĝu por  
Oponi Nian Komunan Malamikon**  
(32p. R.09, £.0-0-9)

**La Malakordoj inter K-do Togliatti kaj  
Ni**  
(48p. R.0.13, £.0-1-0)

**Leninismo kaj Moderna Reviziismo**  
(20p. R.0.06, £.0-0-6)  
(En la lingvoj Esperanto, angla, franca, hispana,  
germana, rusa, japana, vjetnama, araba kaj taja)

**Proletoj de Ĉiuj Landoj Unuiĝu por  
Oponi Nian Komunan Malamikon**  
(pliampleksigita eldono)  
(88p. R.0.19, £.0-1-6)

**Ni Unuiĝu sur la Bazo de la Moskva  
Deklaracio kaj Moskva Deklaro**  
(40p. R.0.09, £.0-0-9)

**De Kie Venis la Malakordoj?**  
(40p. R.0.09, £.0-0-9)

— Respondo al k-doj Thorez kaj aliaj  
(En la lingvoj Esperanto, angla, franca, hispana,  
germana, rusa, japana, vjetnama, araba, taja kaj  
hinda)

**Refoje pri la Malakordoj inter K-do  
Togliatti kaj Ni**

— Pri kelkaj gravaj problemoj de  
leninismo en la nuna tempo  
(196p. R. 0.35, £.0-2-0)

**Komentario pri la Deklaro de la Komu-  
nista Partio de Usono** (20p. R. 0.06, £.0-0-6)

**Spegulo por Reviziistoj** (16p. R. 0.06, £.0-0-6)  
(En la lingvoj Esperanto, angla, franca, hispana,  
germana, rusa, japana, vjetnama, araba, taja,  
hinda kaj itala)

Eldonis

**FREMDLINGVA ELDONEJO**

Aĉeteblaj ĉe: **Guozi Shudian**, Poŝtkesto 399,  
Pekino, Ĉinio

## Pri la Ortografio de Propraj Nomoj

Post la publikigo de la artikolo de k-do Gruŝko, venis jam ses artikoloj pri tiu ĉi temo, kaj ili jam aperis en nia gazeto. En ili oni trovas opiniojn ambaŭ por kaj kontraŭ la E-transskribo de propraj nomoj. Ŝajne oni jam povas fari en ili decan konkludon kaj ne necesas daŭrigi la diskutadon. Sed nun venis denove tri artikoloj de germana, nederlanda kaj ĉina esperantistoj. Konsiderante, ke ĉiuj antaŭaj artikoloj estas verkitaj de slavaj popolanoj, ni ilin aperigas en tiu ĉi numero. En la venonta numero ni publikigos nian opinionon pri tiu ĉi temo kaj se eble resumon de k-do Gruŝko, kiu laŭdire ricevis multajn leterojn ankaŭ pri lia artikolo.

LA RED.

### Jen Opinio de Germana Esperantisto

En EPĈ n-ro 3 pledis por la transskribo en Esperanton de la propraj nomoj kvar legantoj. Versajne ĉiuj kvar majstras la rusan aŭ la bulgaran lingvojn. Oni povus kredi, ke tiu vidpunkto estus tipe rusa. Tial mi, germano, volas esprimi mian plenan konsenton al la Gruŝkoa vidpunkto. Mi ne nur estas tre kontenta, ke

almenaŭ la ĉinoj, japanoj kaj araboj en Esperanto-tekstoj nur uzas Esperanton, sed mi ankaŭ volas emfazi, ke la latina abc tute ne havas la saman signifon por la diversaj latinliteraj lingvoj. Ekzemple la familian nomon 'Paraige' franco elparolas tiel, ke anglo ne komprenas ĝin kaj inverse. Germano ree prononcas ĝin tute aliel. Kial kroĉi sin al la latinaj literoj, se ekzemple germano aŭ franco 'a' legas 'a',

sed anglo plej ofte 'e'? 'Au' por germano estas 'aŭ', sed por franco 'o'. 'Waringhien' por ĉiuj esperantistoj certe estas tre konata sciencisto, bedaŭrinde la nomo nur optike. Ankaŭ la plej multaj okcidentlingvanoj ne scias, kiel sonas tiu vorto, same, kiel mi, germano, ne scias kiel sonas 'William Auld'. Ĉu mi legu ĝin korekte 'Viliam Aŭld'? Aŭ ĉu li estas ofendita, aŭdi tiel sian nomon? La poloj ankaŭ uzas



latinajn literojn, sed mi estas certa, ke ili komprenas eĉ ne unu vorton, se mi laŭlegas al ili ion el pola gazeto. Same germano ne povas kompreni germanan tekston, legatan de franco, kiu ne scias la germanan lingvon. Do, per tio mi nur volis montri, ke ankaŭ eĉ inter anoj de latinliteraj lingvoj la skribado de propraj nomoj en Esperanta teksto estas tute senkaŭza. Mi proponas nepre uzi la Esperantan abc kaj se necese aldoni en krampoj la originan skribmanieron en kiu ajn lingvo. Mi senpacience atendas Esperantan mapon. Kio estas ĝusta: Budapeŝto aŭ Budapeŝto? Mi longe kredis, ke por nombro da gravaj ĉefurboj jam longe ekzistas Esperanta ortografio. Kial subite 'Vieno' por la aŭstra ĉefurbo ne plu estas akceptebla? Mi nur atendas, ke ankaŭ anstataŭ 'Pekino' subite aperos en EPĈ ĉina signo! Ke pro la nesufiĉa instruiteco de multaj el nia poŝt-oficistoj ni devas uzi por la adresoj kiel eble plej la nacian lingvon de la adresato, tio ja estas memkomprenebla.


L. ŜJODIL (L. SCHÖDL), DDR.

## Averto pri Ortografio de Nomoj

Leginte diversajn opiniojn pri fonetika transskribo de propraj nomoj, mi nepre devas konkludi pri neebleco de konkreta solvo de la cetero ne tiom grava problemo.

Povas esti ke laŭ opinio kaj informo de s-ano O. KINGSEP la alĝustigo de fremdaj nomoj al nacia alfabeto ĝenerale estas praktikata de ĉiu nacio, sed, tio ne estas tute vera, kaj, tiurilate ni atentigas pri francaj nomoj (kaj ceteraj fremdlandaj nomoj), kiuj en la okcidenta parto el nia eŭropa kontinento vere ne estas laŭ fonetiko transskribata.

Laŭ artikolo de s-ano ANDREEV, Bulgario oni devus doni la fonetikan transskribon k.t.p. Prave, sed, nur prave se tio absolute eblus,



# Propono pri la Ĝenerala Linio de la Internacia Komunisma Movado

**La Responda Letero de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio al la Letero de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Sovetunio Datita je la 30-a de Marto, 1963** (La 14-a de junio, 1963)

ALDONO:

Letero de la Centra Komitato de la Sovetia Kompartio al la Centra Komitato de la Ĉina Kompartio (La 30-a de marto, 1963)

Letero de la Centra Komitato de la Ĉina Kompartio al la Centra Komitato de la Sovetia Kompartio (La 9-a de marto, 1963)

Letero de la Centra Komitato de la Sovetia Kompartio al la Centra Komitato de la Ĉina Kompartio (La 21-a de feb., 1963)

110 p. 18.5 × 13 cm. Prezo: £.0-1-6, Rb. 0.19

En la lingvoj Esperanto, angla, rusa, franca, germana, hispana, vjetnama, korea, japana, hinda, indonezia, birma, taja kaj araba.

Eldonis la **Fremdlingva Eldonejo**, Pekino, Ĉinio

Disvendas **Guozi Shudian**, P. O. kesto 399, Pekino, Ĉinio

ĉar prave oni asertas alĝustigon de fremdlandaj nomoj nur parte ebla, eĉ pere de Esperanto.

Efektive, ne ekzistas ebleco pri fonetika transskribo de la francaj sonoj "au" kaj "eu" kaj krome ne de la nederlandaj sonoj "au" kaj "eu". Pleje apudiĝas tiujn hollandajn sonojn la esperantaj "aŭ" kaj "eŭ", sed, se iu tiujn sonojn laŭ esperanto-fonetiko elparolus, li grave fiaskus.

En iu artikolo ni legis la nomon ŜEKSPIR laŭ Esperanto-fonetiko skribita. Nur la posta parto estas prava dum la unua silabo estas tute malĝusta precize la "e"-vokalo.

Kvankam ni nepre ne deziras nei iaman necesecon fonetike alĝustigi nomojn, ni tamen subskribas la opinion de s-ano DOLINSKI.

Per kelkaj ekzemploj kvankam tre maldetale ni informis pri neebleco de konkreta solvo, kaj, legiaj estas la maleblecoj pri alĝustigo de la diversaj sonoj konsidere la nombron de la enmondaj lingvoj kaj la ebloj pri kiuj la esperanta alfabeto disponigas.

Iomete ni miras pro atentigo koncerne ideografiojn, ĉar, neniuj redakcio emos presigi internacian revuon per tiaj esprimiloj aŭ hieroglifoj, do, redaktoro devos

uzi latinajn literojn krome por menciado de nomoj.

Cetere, eĉ d-ro Zamenhof kelkfoje ne atentis pri fonetika skribmaniero kaj parolis pri "Varsovio" dum la pola urbonomo estas "Warszawa", oni elparolas tiun nomon "Varŝava" do en Esperanto "Varŝavo". Ĉu d-ro Zamenhof eble iom sugestis pri ne troa artefarigo de la lingvo?

Mi devas grave averti pri la fonetika problemo koncerna. Nian Esperanton ni deziras esti internacia lingvo kaj nur tia internacia lingvo kiel kapablas solvi ĉiujn lingvajn problemojn rajtas tian pretendon. Se ne ekzistas absoluta solvo konkreta de fonetikaj malfacilaĵoj koncerne fremdlandajn nomojn, oni evitu klopodojn. **AVERTI NI DO DEVAS**, ĉar, nia lingvo neniam enhavu ion nekompletan, ion nedezirindan kaj ion nesolveblan. Se ni en Esperanto klopodos fonetike skribi nomojn, ni en ĝin enkondukas ion nekonkrete solveblan, do ion nedezirindan do ion nekompletan. Ni skribu la nomojn nacilingve. Tiamaniere ni evitos krei atakeblon al malamikoj de nia ĉarma idiomo.

ANTON A. LEENHARD,  
NEDERLANDANO

## Ankaŭ pri Propraj Nomoj

Kun intereso mi tralegis ĉiujn artikolojn pri tiu ĉi temo en EPĈ. Tio ja estas problemo kaj devas esti solvita kiel eble plej rapide, logike kaj science.

Resume, ĝis nun ekzistas jenaj opinioj pri transskribo de propraj nomoj:

- 1) Nur uzi naciajn originalojn sen esperanta transskribo.
- 2) Nur uzi esperantajn transskribojn sen naciaj originaloj.
- 3) Ĉefe uzi naciajn originalojn kun esperanta transskribo en parentezo.
- 4) Ĉefe uzi esperantajn transskribojn kun naciaj originaloj en parentezo.



# VIVU LENINISMO

18.5 cm. × 13 cm., 130 p.

Tiu ĉi libro enhavas la jenajn tri artikolojn: "Vivu Leninismo!", verkita de la redakcio de la gazeto "Ruĝa Flago"; "Antaŭen laŭ la Vojo de la Granda Lenin!", verkita de la redakcio de la ĵurnalo "Renmin Ribao" kaj "Unuiĝu sub la Revolucia Standardo de V. I. Lenin!", parolado farita de kamarado Lu Dingji, kandidata membro de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, je la 22-a de aprilo, 1960, en la Rememoriga Kunveno pri la 90-a Datreveno de la Naskiĝtago de V. I. Lenin okazigita de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio.

**Eldonis FREMDLINGVA ELDONEJO  
Disvendas la LIBOSERVO DE ĈEL.**

Laŭ konsidero pri internacia lingvo, la 1-a estas neebla. Ĉar multaj ne konas la prononcon de alilandaj alfabetoj precipe tiujn de nelatinliteraj lingvoj kiaj la ĉina kaj rusa.

Por korespondado la 2-a estas nesufiĉa, ĉar ne ĉiuj poŝtovicistoj scias la Esperantan transskribon.

La 3-a ŝajne ne estas racia, por Esperanto, lingvo internacia, kaj la 4-a ŝajnas la plej bona kaj akceptebla en nuna etapo.

Kelkaj samideanoj oponentaj Esperantan transskribon opinias ke Esperanto ne povas transskribi nacian lingvon precize kaj fonetike. Tio estas fakto, kaj fakto ankaŭ por ĉiuj naciaj lingvoj, sed tio neniel malhelpas la transskribon de fremdaj propraj nomoj. Esperanto ne povas esti escepto.

Por Esperanta transskribo la lingvistoj-esperantistoj de ĉiulando devas ellabori transskriban sistemon de sia lingvo. Kaj la aŭtoroj bezonas nur doni en siaj

verkoj la ekvivalento-alfabeton kun klarigo de internacia fonetika alfabeto en pied-notoj.

Konkrete mi proponas:

1) Uzi en la transskribo la proksimumajn literojn, ekzemple: la esperantan "r" por ambaŭ la anglan frikativan "r", kaj la rusan vibran "p" kaj la francan uvulan "r".

2) uzi diftongojn kaj konsonantajn diftongojn (Se mankas la proksimumaj). Ekzemple por la rusa "Я" uzi "ja", kaj por "bl", "ui". Cetere, por la ĉina (l) uzi "ng".

3) Senpere uzi internacian fonetikan alfabeton. Estas dezirinde, ke ĉiuj esperantistoj scipovu la ĉefajn prononcojn de la internacia fonetika alfabeto.

4) uzi (prefere ne) aldonajn signojn. Ekzemple, la germana ö kaj ü povas resti netuŝitaj.

ŜI JONGNING, ĈINIO.



MASAO UEJAMA (el Japanio):

## *Al Ĉinaj Kamaradoj*


DANKE AL LA MESAĜO DE ĈINA ESPERANTO-LIGO, SENDITA AL KJUŜU-KONGRESO LA 37-A.

*Birdoj kantas floroj belas,  
ĉio sub la suna brilo  
Jen jubilas jen juvelas.  
Vidu! Ĉio en trankvilo.*

*Sed, ve, en la mondo homa  
malhomeca murd' minacas  
per prepar' de bomb' atoma,  
pereigi nin aŭdacas.  
Ĉu ni lasu do senfaraj  
nin en la man' kruela?  
Ne, neniam, ho vi karaj  
kamaradoj! Paco l' vera  
estas starigota de ni  
per frateco kaj solido.  
Baldaŭ poste povos beni  
ni nin kun plengaja rido.  
Man-en-mane, kor-ĉe-kore,  
ni batalu en persisto.  
Kion nomas ni honore:  
Dev' de l' esperantisto.*

# ESPERANTO MARŜAS

## Esperanta Ekspozicio en Pekino



Jam en pasinta jaro ĈEL komencis preparadon de esperanta ekspozicio por festi la kvinan jaron de la reaperiĝo de nia gazeto. Nun la ekspozicio estas efektivigita. La kolektitaj materialoj estas arte aranĝitaj en kvar ĉambroj. Libroj, gazetoj kaj riĉaj korespondaĵoj kaj bildoj senditaj de niaj legantoj multe interesis la vizitintojn kiujn forte impresis la internacia amikeco de la monda esperantistaro. Ĝin inaŭguris k-do Hujucz, prezidanto de nia Ligo je

la 21-a de julio kaj ĝi daŭris ĝis la komenco de aŭgusto.

## Renkontiĝo de Ĉinaj Esp-istoj en Pekino

De la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto ĉijare okazis en Pekino renkontiĝo de esperantistoj el Ŝanhajo, Vuhan, Kantono kaj aliaj urboj de Ĉinio. Ili vizitis la esperantan ekspozicion aranĝitan de ĈEL kaj interŝanĝis opiniojn pri la esperanta movado en nia

lando. Proponoj por antaŭenpuŝi la movadon estas faritaj kaj konkretaj paŝoj por ilin efektivigi estas projektitaj.

Dimanĉe de la renkontiĝo partoprenintoj, sub gvido de lokaj esperantistoj ekskursis al la subtera palaco t. e. la maŭzoleo de la Imperiestro Ŝenzong (surtrone: 1575-1620 p.K.) de Ming-dinastio, post la ekskurso ili ĝuis, kune kun pli ol 80 pekinaj geesperantistoj gajan vesperon aranĝitan de loka Esperanta grupo.


## Nova Sidejo de Hanoja Esperanto-Klubo

Hanoja Esperanto-Klubo antaŭ nelonge translokiĝis al nova ejo, situanta meze de la ĉefurbo kaj multe trapasata avenuo (65 st. Trang Thi). La hanojaj gesamideanoj inaŭguris la "verdan hejmejon" en la granda kaj bela salono. Oni pridiskutis la agadprogramon de la Klubo, kaj decidis, ke la klubejo fariĝos konstanta ekspoziciejo de esperantaĵoj. Tiucele, la estraro de la Klubo estas preta interŝanĝi esp-eldonaĵojn kun ĉiuj landoj. Bonvolu skribi al Esperanto-Klubo, 53, Trang Thi,

Hanojo, Vjetnamio (via USSR aŭ Via Pekino)

## 37-a Kongreso de la Kjuŝua Esperanto-Ligo

La Kjuŝua Esperanto-Ligo estas unu el la fortaj lokaj organizoj



de la japana E-movado. Ĉijare ĝi okazigis sian 37-an kongreson. Laŭ informo kaj ricevita registra sonbendo de la kongreso, parolis en la kongreso plejparte junaj gesamideanoj. Tio estas nova gratulinda tendenco de la japana E-movado, ke oni donas pli multe da atento al eduko de junaj esperantistoj. Ĉi tie ni aperigas kelkajn fotojn de la kongreso.

## Nova E-rondeto en Litova SSR

Urba gazeto "Darbas" (La Laboro) de la 31, V, 1963 de urbo Pasvalys (Litova SSR) informas ke tie ĉi organiziĝis Esperanto-Rondeto ĉe Kulturdomo, kaj ankaŭ kursoj. Samtempe, en kulturparko, okazis ekspozicio de Esperanto-literaturo.

K-do Valaŝinas el najbara urbo Ioniŝkelis multe parolis

pri la granda valoro de la internacia lingvo por la paca laboro inter la popoloj.

Oni deziras ricevi multajn kuraĝigajn leterojn de la tuta mondo. Ĉion adresu al LITOVA SSR, PASVALYS, KULTUROS NAMAI, ESPERANTO-RONDETO.

## Esperanto Deviga Studobjekto de Pola Liceo

La pola Ministerio de Edukado donis permeson al la liceo en Sosnowiec enkonduki la internacian lingvon kiel devigan studobjekton por la liceanoj. La unua abiturienta ekzameno pri Esperanto jam okazis en la ĉeesto de la televido. (IGS 546)

## Esperanto-Tradukistoj kaj Verkistoj en Ĉeĥoslovakio

La Esperanto-Tradukistoj kaj Verkistoj en Ĉeĥoslovakio grupiĝis ĉe ĈSEK por faciligi kaj plibonigi la laboron en literatura fako. La prepara komitato konsistas el: R. Hromada, d-ro T. Pumpr, J. Kořinek, M. Lukáš, d-ro L. Izák, E. Urbanová, J. Čichová, inĝ. E. Felix. La grupo kontaktos kun la Sindikato de ĉeĥoslovakaj verkistoj kaj pritraktos detalan programon de reci-

## LIBROSERVO DE Ĉ.E.L.

La Libroservo de Ĉ.E.L. celas havigi al esperantistoj kaj Esperantaj organizoj rapide kaj facile Esperantajn eldonaĵojn de Ĉinio. Ĝiaj ĉefaj servoj estas:

- \* eksporti ĉinajn Esperantajn eldonaĵojn, nome: akcepti abonojn al *El Popola Ĉinio* kaj mendojn al eldonaĵoj de Ĉ.E.L. kaj la Fremdlingva Eldonejo de Ĉinio, kaj zorgi pri la distribuaj aferoj, inkluzive la korespondadon kun la perantoj, abonantoj (mendantoj) kaj specimenpintoj ktp.
  - \* importi Esperantajn librojn interŝanĝe
  - \* liveri senpagan provspecimenon de la Esperanta revuo *El Popola Ĉinio* al la petantoj kaj specimenojn de ĉinaj Esperantaj libroj por varbado kaj utiligo
  - \* liveri senpage katalogon, prospekton kaj aliajn presajojn de Esperantaj eldonaĵoj de Ĉinio
- Favora rabato por niaj perantoj estas garantiata. Ankaŭ la pogranda mendantoj ĝuas tian favoran rabaton. Oni ankaŭ povas unue mendi kaj pagi poste aŭ mendi kredite, aŭ laŭ aparta interkonsento pagi per siaj libroj.

Ni estas ĉiam pretaj servi al niaj perantoj, abonantoj, mendantoj kaj legantoj. Se vi deziras ion el Ĉinio en Esperanto, bonvolu vin turni al niaj perantoj aŭ rekte al ni.

**LIBROSERVO DE ĈINA ESPERANTO-LIGO**  
**P. O. KESTO 313, PEKINO, ĈINIO**

proka kunlaboro. Laborsekretariaro de la grupo estas formita. Ĝi eldonas malgrandan multobligitan cirkuleron por ĝiaj membroj.

### Organizo de Arkitekturisto-Esperantistoj en Ĉeĥoslovakio

Estas organizita Esperanto-Grupo por Arkitekturo kaj Konstruado en Ĉeĥoslovakio ĉe la Centra Komitato de Sciencoteknika Societo en Praha. La grupo sendadas al 24 landoj ĉeĥolingvajn fakgazetojn "Arkitekturo" kaj "Edific-konstruaĵoj" kun esperantaj resumoj.

### Internacia Ekspozicio en Tourcoing, Francio

Post televida traduka konkurso, grava E-ekspozicio okazos ĉe la teks-urbo Tourcoing (Francio) de la 12-a ĝis la 20-a de oktobro. Dum la informa semajno, la loka rondo organizos landliman renkontiĝon kaj debatojn.

Laŭ L. Giloteaux, Francio.


### Esperanto en Finna Somera Universitato

En la urbo Lappeenranta de Orienta Finnlando okazas de kelkaj jaroj someraj kursoj por studentoj. Laŭ iniciato de la gvidanto de la kursoj, Prof. D-ro Elli Saurio, ekde julio ĉijara la internacia lingvo Esperanto estos regula fakto de la somera universitato. Okazos diplomekzamenoj por instruistoj de Esperanto, kaj studentoj pri mastrumada ekonomio havos la rajton ekzameniĝi pri la Internacia Lingvo anstataŭ pri alia fakto.

(IGS 544)

### Esperantaj Gelernantoj de Bulgario Festis la Unuan de Majo

En Komerca Gimnazio en la urbo Mihajlovgrad de Bulgario 200 gelernantoj lernas Esperanton. La bildo montras la festan paradon de la gelernantoj.



## Libroj kaj de Maŭ Zedong

|                                                                                                         | P. | Formato-<br>cm. |     | Rb.  | £      |
|---------------------------------------------------------------------------------------------------------|----|-----------------|-----|------|--------|
| <b>Pri Praktiko</b>                                                                                     | 30 | 13.2×18.7       | bd. | 0.18 | 0- 1-5 |
|                                                                                                         | 28 |                 | br. | 0.09 | 0- 0-8 |
| <b>Pri Popoldemokratia Diktaturo</b>                                                                    | 30 | 13.2×18.7       | bd. | 0.18 | 0- 1-5 |
|                                                                                                         | 28 |                 | br. | 0.09 | 0- 0-8 |
| <b>Interparolo kun Usona Ĵurnalistino<br/>Anna Louise Strong</b>                                        | 22 | 13.2×18.7       | bd. | 0.18 | 0- 1-3 |
|                                                                                                         | 20 |                 | br. | 0.08 | 0- 0-6 |
| <b>Raporto al la Dua Plena Sesio de<br/>la Sepa Centra Komitato de la<br/>Komunista Partio de Ĉinio</b> | 34 | 13.2×18.7       | bd. | 0.18 | 0- 1-5 |
|                                                                                                         | 32 |                 | br. | 0.07 | 0- 0-7 |
| <b>Komentarioj pri la Blanka Libro</b>                                                                  | 66 | 13.2×18.7       | bd. | 0.20 | 0- 1-7 |
|                                                                                                         | 64 |                 | br. | 0.13 | 0- 1-0 |
| <b>Paroladoj ĉe la Literatura kaj<br/>Arta Kunsido en Jan-an</b>                                        | 52 | 13.2×18.7       | br. | 0.09 | 0- 0-9 |
| <b>La Nuna Situacio kaj Niaj Taskoj</b>                                                                 | 40 | 13.2×18.7       | br. | 0.07 | 0- 0-7 |
| <b>Pri la Ĝusta Traktado de Kon-<br/>traŭdiroj Interne de la Popolo</b>                                 | 44 | 13.2×18.7       | bd. | 0.24 | 0-1-11 |
|                                                                                                         | 42 |                 | br. | 0.13 | 0- 1-0 |

ELDONIS ĈINA ESPERANTO-LIGO  
MENDU ĈE PERANTOJ AŬ LIBRO-SERVO DE  
ĈEL: P. O. KESTO 313, PEKINO, ĈINIO

### Esperanto en Venezuela Universitato

Komence de la jaro 1963 ekfunkciis en la Universitato de Caracas baza kurso de Esperanto

organizita de la Fakto de Ĝeneralaj Studoj de la Direkcio de Kulturo. La lecionoj estas donataj trifoje semajne.

(IGS 545)





### 37-a Kongreso de la Kjuŝua

Esperanto-Ligo

**SENELIREJO**—eldonita de Fremd-lingva Eldonejo, Hanojo, Vjetnamio, tradukita de geesperantis-toj de E-klubo, Hanojo, reviziis Nguyen Minh Kinh. Formato 19 × 13 cm. 278 paĝoj.

Romano de la veterana vjetnama verkisto Nguyen Kong Hoan. Ĝi unue aperis en vjetnama lingvo en 1938, sed ĝia cirkulado estis malpermesita de la francaj koloniistoj ses monatojn post la eldono. En tiu romano la aŭtoro pentris la vivon de vjetnamaj vilaĝanoj sub la duobla subpremado de francaj kaj lokaj reakciuloj. La heroo Fa estis simpla, laborema kaj honesta kamparano, kiu perdis sian edzinon, infanon, sian mizeran pecon da tero kaj finfine sian liberecon kaj vivon kiel rezulto de la manovroj kaj intrigoj de la bienulo Nghi Lai kun la helpo de distriktestroj, vilaĝestroj kaj aliaj sango-sučantoj. La tragedio de Fa ne estas individue lia, ĝi ripetiĝis kaj ankoraŭ ripetiĝas milionfoje en la vivo de kampuloj ĉie kie regas la imperiistoj kaj feŭdaj bienuloj.

Tial kvankam la verko estas vjetnama, ĝi havas pli vastan signifon. Ĉu senelirejo? Tion ja respondis la bataloj de la vjetnama popolo.

La traduko estas ĝenerale flua. Tamen troviĝas en ĝi esprimoj kaj neologismoj nefacile komprene-

de la  
okazi.  
Laŭ i  
sonbe

# Sur Nia Libroreto

blaj. Estas dezirinde ke ili estos poluritaj en la estontaj eldonoj.

SUMO

**LA KAMPANJO KAO LANG**  
Verko de Nguyen Huy Tuong, tradukita de Nguyen Minh Kinh kaj Nguyen Minh Tung kaj eldonita de Fremdlingva Eldonejo, Hanojo, Vjetnamio, 1962. Same kiel la alia vjetnama libro *Nia Heroa Popolo* (Legu sur paĝo 289 de EPĈ N-ro 6, 1962) tiuj ĉi memorajoj pri la monumenta ofensivo por la liberigo de Kao Lang bildigis al mi la heroecon de la vjetnama popolo.

ZEN

**PROVO ALFRONTI LA VIVON**  
—originala poemaro de Ivan St. Georgiev, la 16-a libro el la Beletraj Kajeroj de STAFETO, 112 p., 19 × 12 cm. Prezo: \$1 aŭ 13.4 steloj.

Kio estas la homa vivo? Al tiu ĉi demando malsamajn respondojn donas homoj kun malsamaj mondkonceptoj. Ivan St. Georgiev asertas:

“Ĝi estas

kaj restas

*lanta mortad' sen motiv'!*”

Kia pesimismo! Kaj per simile griza koloro G. portretas la homaron, kies ano li ja “estas kaj restas”:

“*Povas esti, pli da belo*

*regos sur terglob',*

*se forestos poreterne*

*homa la mikrob'. . .”*

kaj:

“*En la mallum'  
de ĉies kor'  
sin kaŝas best'”*

kaj krome:

“*Gregoj*

*gregoj*

*gregoj—*

*homaj gregoj*

*tra ventegoj*

*de l' jarcentoj*

*blinde iras*

*kaj deliras—*

*fiaĵojn lasas .*

*kaj forpasas. . .”*

Se la vortoj de G. temus nur pri la kruelaj ekspluatantoj—la sklavmastroj, la servutul-posedantoj, la kapitalistoj, imperiistoj kaj koloniistoj—ili povus vekti simpatian ĉe la adeptoj de D-ro Esperanto; ĉar tiaj fiuloj estas vere vivantaj mortantoj aŭ eĉ mortintoj, bestoj en homa haŭto kiuj sin okupas nur per friponaĵoj. Ĉu estas prave kaj prudente grizigi la tutan homaron, kies plejparton konsistigas la laboranta popolo kiu ĉiam klopodas por mondo pli bela? La lingvo kaj versfara arto de G. estas altnivela; la papero, bona; la preso, plaĉa; aranĝo de la kovrilo, artisma—kaj mi domaĝas ĉion ĉi tion pro la griza enhavo.

LAŬLUM

## Scienca kaj Teknika Rondo

Antaŭ nelonge aperis la 1-a numero de la ĵus naskiĝinta “Scienca kaj Teknika Rondo” de *Grajnoj en Vento*. Laŭ la enhavtabelo oni povas konstati, ke la komenco de la Rondo estis sukcesa. Por la 2-a numero jam anonciĝis, krom la fondmembroj, deko da aliaj sciencistoj-esperantistoj. Estas dezirinde pli multe da aktivaj membroj kun-

laboros kun ĝi por ke aparta fakrondo estu starigita.

La kunlaboradon oni povas fari, ĉu rekte per propraj originalaj **NATURSCIENCAJ KAJ (AŬ) TEKNIKAJ VERKAĴOJ**, ĉu per taŭgaj tradukoj de aliaj sciencistoj. La aktivaj kunlaborantoj devas sendi 50 kopiojn de la koncerna kontribuajo al la Rondgvidanto, kiu prizorgas la kunigadon de la ricevita materialo,

kaj la distribuadon de la komune eldonitaj kajeroj al partoprenantoj, E-bibliotekoj, ktp.

Oni petas al ĉiuj gesamideanoj interesitaj TUJ skribi al la Rondgvidanto. Li respondos TUJ sciigante pliajn detalojn por realigi la kunlaboradon. (Laŭeble, aldonu respondkuponon)

La Rondgvidanto: Alberto Barrocas, Yaguarí 2248, Ap. 3, Montevideo, Urugvajo

# Literaturaj Verkoj kaj

# Aliaj Libro

## ĈINA ANTOLOGIO (1949-1959)

P. 416 23×15.3 cm. bd. R. 1.20 £.0-10-0

## Poŝtmarkoj de la Ĉina Popola Respubliko

P. 88 18.5×26 cm. bd. R. 0.60, £0-8-6

## Vivu Leninismo

P. 110 14×20.2 cm. br. R. 0.16, £.0-2-0

## Rakontoj pri Fantom-spitantoj

P. 104 12×18.7 cm. br. R. 0.33, £.0-2-7

## La Kultura Vivo de la Ĉinaj Laboristoj kaj Oficistoj (kun 90 fotoj)

P. 72 16.2×18.4 cm. br. R. 0.25, £.0-2-0

## Pejzaĝoj de Ĉinio (albumo kun 48 fotoj, el ili 13 kolorpresitaj)

P. 52 24×26 cm. br. R. 0.63, £.0-5-0

## Pitoreskajoj de Pekino (12 kolorpresitaj pk.)

br. R. 0.13, £.0-1-0

## NOVELOJ DE LUSIN

P. 534 13×21 cm. bd. R. 1.61, £.0-12-9

## Knabino kaj Garolo (kolorpresita bildrakonto)

P. 38 17×25 cm. br. R. 0.38 £.0-3-0

## Karpetoj Transsaltis la Drakpordon (kolorpresita bildrakonto)

P. 32 18×20 cm. br. R. 0.16 £.0-1-3



## Sinjoro Dongguo (bildrakonto adaptita laŭ antikva fablo)

P. 88 14.8×18.9 cm. br. R. 0.19 £.0-1-6

## La Okcidenta Ĉambro (bildrakonto)

P. 88 13×17.5 cm. br. R. 0.19 £.0-1-6

## Mi Volis Viziti Lernejon (bildrakonto, elĉerpita)

## Lerta Virineto (bildrakonto, elĉerpita)

## Por Nova Afero Nova Maniero (noveloj, elĉerpita)

## Homo (12 kolorpresitaj pk. elĉerpita)

## Floroj kaj Birdoj (12 kolorpresitaj pk., elĉerpita)

## Laŭdezira Kalkulo de Kennedy

P. 32 13.2×18.7 cm. br. R. 0.07 £.0-0-7

Eldonis ĈINA ESPERATO-LIGO



## Korespondi Deziras

\* **Simeon Stojmenov**, *Musala-str. n-o 7, Kolarovgrado, Bulgario, nova esp-isto, laŭprofesie oficito, dez. kor. kun ĉl. pri ĉt.*

\* **Marijka Stanĉeva**, *Batemberg-str. n-o 15, Kolarovgrado, Bulgario, edzino, dez. kor. pri dommastrado kaj pri aliaj temoj kun ĉl.*

\* **Arne Bengtsson**, *Abybergsgatan 32. Mōlndal, Svedio, 44-jara laboristo, dez. kor. pri literaturo, arto kaj la naturo.*

\* **S-ano Eūgenij Steŝenko**, *Moskvo, A-287, do vostrebovanija, Sovetio, 25-jara instruisto, dez. serioze kor. kun ĉl. pri ĉt. kaj interŝ. pk. pm. E-librojn, E-insignojn, Esp-ajojn.*

\* **Grzeskiewicz Danuta** en *Kleczew, pow. Konin, Pollando, dez. kor. kun ĉl. Ĉiu ricevos respondon de mi aŭ de miaj gekolegoj (15-18 jaraj).*

\* **Christa Pohle**, *Berlin-Mahlsdorf, Briesener Weg 69, DDR dez. kor. kun ĉl. per il. pk kaj leteroj.*

\* **Sandor Domosi**, *Varpalota, Poŝt-fako 48. Hungario, dez. kor. precipe kun orientaziaj esp-istoj (ĉina, japana, mongola, vjetnama, nepala, ktp.) pri folkloro, grafiko, pentrarto kaj interŝ. p. il. kaj pm.*

\* **S-ano Jean Plat**, *36 rue Voltaire, Levallois-Perret (Seine), Francio, dez. interŝ. pensojn kaj ideojn per fot. p. k., kies bildoj montras metiojn, nacikostumojn, vilaĝfestojn, dancistojn, sovaĝbestojn, ktp. Ĉiu certe ricevos respondon, kun parizaj pk. Ŝatas ankaŭ specialajn pm. Afranku filatele.*

\*Hungaraj studentinoj 18-jaraj volas korespondi kun ĉl. pri ĉt. k interŝ. belajn bk. Jen iliaj nomoj k adresoj: Koltai Eva, Budapest, IV. Ujpest, Virag u. 46 a. Kabai Ilona, Budapest, IV. Ujpest, Munkasotthon u. 17. Kliegl

Katalin, Budapest, IV. Ujpest, Pozsonyi u. 8. Mentsl Maria, Budapest, IV. Chinoin u. 38.

\*La jenaj geesp-istoj en Bulgario dez. kor. kun ĉl. k interŝ. bk. k fotojn:

s-ino Stojanka Stojanova, Ruse, str. As. Zlatarev 16

s-ino Ruĵa Dimitrova, Ruse, str. Zdravko Campoev 85

s-ro Ivan Ivanov, ĉefkontisto, Ruse, Bulv. C. Osvoboditel 7

s-ro Dimo Vâlĉev, poŝtoficisto, Ruse, str. D. Korsakov 5

f-ino Lidija St. Kovaĉeva, Ruse, str. st. Dmitrov 18

f-ino Margarita Stojkova, Ruse, str. Gurguljat, 4/IV

\*s-ro Frank Murphy, 146 Warwick Rd, Weston Estate, Macclesfield, Cheshire, England, dez. kor. kun ĉl. k ricevi Esp. gazetojn.

\*Osipov V. S. (56j. pensiulo), USSR st. Ingaŝ, Krasnojarkij Kraj, Poselok Ŝpalozavod, Radiostancija, dez. kor. pri statoj de gepensiuloj kaj pri organizo de Esp. kursoj.

\*V. Blauzdys, Raguva, Panevezys, Litova SSR, USSR, dez. kor. kun seriozaj s-anoj el orientaj landoj pri E-movado, literaturo, ktp. interŝ. E-ajojn, bk.

\*Samideano en farmacia branĉo serĉas gekorespondantojn el ĉl. k kolektas il. pk. ktp. Skribu al Werther Gennert, Berlin C2, Raupachstr 4 II

\*Jan Wesotowski, Warszawa 82, ul. Z. Natkowskiej Nr. 9m 64, Pollando, kolektas pm. k bk.

\*50 gejunuloj k 5 plenaĝuloj kor. pri ĉt. kun ĉl, interŝ. pk, pm. kc. Skribu al: Grzeskiewicz Edmund, Kleczew, pow. Konin, Pollando.

\*Modesto Urban, Moskvo, I-18, Oktjabriskaĵa 4;46, USSR, dez. kor. pri "Ŝjan-ĉi"-ludo aperigita en "El Popola Ĉinio".

\*s-ro Vladimir Maly, Jiraskova 1302, Horice v Podkr. Ĉeĥoslovakio, bezonas adresojn el ĉl. por du Esp. rondetoj: gejunuloj de mezlernejo 14-16 jaraj k gelaĵoruloj de teksa uzino 16-55jaraj, plimulte virinoj, por interŝ. pi, pm.

(Daŭrigo sur p. 249)

# EL Popola Ĉinio

Dumonata gazeto eldonita de  
ĈINA ESPERANTO-LIGO

P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

**N.ro 5 (82) 1963**

## Ĉefa Enhavo

*Bildo sur la kovrilo — Ujgur-nacia Danco Foto de Li Lanĵing*

Batalo kontraŭ la Naturo 207

Abundaj Varoj, Vigla Komerco 210

La Industria Produkto de la Unua Jarduono de 1963 212

Piasta Industrio de Ĉinio 214

Reviviĝis Mano Detranĉita 216

En la Fabriko kaj en la Hejmo 217

Dato por Geedziĝo 220

Ankaŭ Orfoj Vivas Feliĉe 224

Lakobjektoj de Jangĝou 225

Gingjang-monteĝo 228

El Ĉina Klasika Poezio 240

Literaturo kaj Ŝvito 241

~~~~~

★Ĉiujn materialojn por nia redakcio aŭ por interŝanĝo sendu al P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio.

★Ĉiuj perantoj, abonantoj kaj specimen-petantoj de nia gazeto sin turnu al **Libro-Servo de ĈEL**: P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio.

★Tradukoj, represoj kaj ĉiuj aliaj bonvolaj utiligoj de la materialoj en nia gazeto estas permesataj kaj dezirataj, ni petas nur tion, ke oni menciu devenon de la materialoj kaj **sendu al ni du ekz. de la presajo** sur kiu aperis la koncerna materialo.





Ŝerco kun Amitabo.

Skulptita de Ĝu Ziçang




La Feino Dissutas Petalojn.

Skulptita de Ĉen Imej

Kaŝludo.

Skulptita de Ĝu Ziçang





山  
 翠  
 水  
 清  
 千  
 年  
 來  
 西  
 頃  
 臥  
 聽  
 船  
 頭  
 東  
 聲  
 丁  
 首  
 綠  
 卷  
 開  
 庚  
 頭  
 者  
 壽  
 韻

Montaro en brilo,  
 Rivero en brilo,  
 Da veloj alflugas jen milo kaj milo.

Sonoras ĉe l' pruo  
 Arĝenta ond-bruo;  
 Kuŝante l' muzikon mi aŭdas kun ĝuo.

Poemo kaj pentraĵo de Pan Tiansou